



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Junio 2019 n-ro: 42



Merhaba,

Temmuz #042 numaralı Turka Stelo dergimizde gene birbirinden farklı, birbirinden ilginç yazılar var. Sizler için seçtiklerimizden bazıları:

- Julian Modest'in yeni kitabı "Amo kaj Malamo" hakkında bir yorum.
- UEA'nın yeni başkan seçimi hakkında bir yazı.
- Sinema severler için "Eve hakkında her şey" adlı filmin bi yorumu.
- Yunan mitolojisinen Oidipus.
- Prof. Dr. Ilber Ortaylı ve Arnavutlar için bir yazı.
- Brezilyadan çok güzel bir şiir : "Yaşam mevsimleri".
- Bertold Breht'in kısa anekdotları.
- Önemli yazarımız Julio Baghy hakkında bir yazı.
- İki bilimkurgu hikaye.

ve daha başka bir çok ilginç makale.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,


En la junia #042 numero de Turka Stelo revuo troviĝas diversaj legaĵoj. Ĉiu havas sian interesecon sed jen kelkaj el ili:

- Recenzo de la libro "Amo kaj Malamo" de Julian Modest.
- Teksto pri la elekto de la nova UEA prezidanto.
- Por kino amantoj recenzo de la filmo "Ĉio pri Eve".
- Edipo el la greka mitologio.
- Rakonto pri la turka profesoro Ilber Ortajlo kaj la albanoj.
- Tre bela poemo el Brazilo: "Vivsezonoj".
- Anekdotoj de Bertold Breĥto.
- Teksto pri nia eminenta verkisto Julio Baghy.
- Du sciencfikciaj rakontoj.

kaj multaj aliaj interesaj artikoloj.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Amo kaj Malamo	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Granda Ŝanco	4
BEL - Konferencoj 2019	5
Eo "Nemateria kultura heredaĵo" en Slovakio	5
Rabindranath Tagore	6
Tempo Sigelita	7
EDIPO (ΟΙΔΙΠΟΥΣ)	8
Tribalismo	10
Kun Amo en la Koro	11
Du mikrorakontoj	11
Prof. Dr. Ilber Ortajlo kaj albanoj	12
Malkovri poetojn nekonatajn	13
Malriĉulo kaj avidulo	14
La frenezulo kaj la paco	15
Vivsezonoj	15
Historioj pri s-ro Kojno (p.2) - Berto Breĥt	18
Ŝercoj	18
Kurcvortenigmo	18
Mallonga Historio de Filozofio (41)	19
Fiŝ-supro de Damieno	20
El la libro de "Dao de Jing" (33)	20
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 13)	21
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	22
Ĉu homaro vojaĝos inter la steloj?	23
La lasta Tago	24
Kiel mi fariĝis E-isto?	25
Tra tempo kaj spaco	26
Ni ne subtaksu Esperanton!	27
Rakonto pri Petro	28
Kavo	28
Mirinda Oranĝarbo	28
Mia renkontiĝo kun Andreo Cseh	29
Ĉu iu memoras la skandalon okazintan en 1934?	30
Ni lernu Esperanton!	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



Finiĝis la kurso de Esperanto en la lernejo
Ŭsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul.
En la somero ne okazos aliaj kursoj.

Amo kaj Malamo

Mi finlegis la tuton de "Amo kaj malamo", la nova libro de Julian Modest, dum preksaŭ 6 horoj. Ĝi estas unu el la serio de detektivaj romanoj pri komisaro Kalojan Stefan. La romano estas alloga ĉar la lingvo fluas kaj la rakonto estas sufiĉe bona, do, ke ĝi ne forlasigas la libron el la mano de la leganto. En la romano la detektivo provas solvi la misteron de du murdoj kaj la sinsekvo de la okazaĵoj estas sufiĉe bone fikciigitaj.

La leganto povas malkovri kiu estas la murdisto se li legas la romanon sufiĉe atenteme kaj rimarkas malgrandan punkton en paĝo ... Ne! mi ne diros tion al vi, trovu ĝin mem aŭ legu la tutan libron ĝisfine. Same en la romano "Gerda Malaperis" de Claude Piron se vi ĝin ankaŭ legis. Mi ankaŭ preskaŭ estis preteratentanta tiun punkton.


Mi kutime havas malfacilaĵon koncentriĝi sur rakontoj, ne nur en Esperanto lingvo sed ankaŭ en aliaj lingvoj kiujn mi scipovas, ekzemple turkaj, grekaj kaj anglaj romanoj pro ilia nekutima vortelekto, vortordo, rakontado ktp. Tamen mi sufiĉe bone konas la verkstilon de Julian Modest. Ĝi estas simpla, tre flua kaj glata kaj liaj libroj estas valoraj ĉefe por progresantoj, kiuj volas plibonigi siajn lingvokapablojn senpene provante malkovri la sencon de la frazoj.

Mi stronge rekomendas la libron de Julian Modest "Amo kaj Malamo", kaj ne nur, al ĉiuj kaj ĉefe al progresantoj.

Vi povas aĉeti la libron el: <http://www.lulu.com/shop/search.ep?contributorId=1553166>

aŭ el <https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9704>

recenzis **Vasil Kadifeli** el Turkujo



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj. Okaze de tiuj konkursoj, mi

proponas al vi partoprenon en lukto, kie homoj ne luktas kontraŭ aliaj homoj, sed kie homo luktas kontraŭ siaj malfortaĵoj. Tiu estas la **Esperanto-Sumoo konkurso** en kiu paralele kun la Sumoo-konkursoj ni legu Esperanto-librojn dormantajn en nia breto. Vi decidu kiun libron kaj kiom da paĝoj vi legu ĉiun tagon dum la konkurso.

La 58-a Sumoo komenciĝis la 12-an de majo kaj daŭris ĝis la 26-a.

Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne ricevis la rezulton de la maja Sumoo, do ilin ni publikigos en la venonta numero de nia revuo.

Ni pensas, ke estas sufiĉe granda nombro da partoprenantoj. Sed tion ni malkovros kiam ni ricevos la statistikojn.

Jen la diversaj rangoj de la luktantoj:

Rango A: perfektaj venkintoj en la lasta sumoo

Rango B: malvenkintoj en la lasta sumoo kaj revekiĝintoj.

Rango C: Novaj partoprenantoj

Nia retejo:

<http://www.esperantosumoo.pl/>


Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_EsperantoSumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 803 (2019-05-15)

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la

Internacia Tago de Familioj, 15 majo 2019

Ĉiujare, je la 15-a de majo, Unuiĝintaj Nacioj festas la Internacian Tagon de Familioj. Tiutage, Unuiĝintaj Nacioj rekonas, ke la familio estas la baza unuo de socio. [...]

N-ro 802 (2019-05-11)

Balotado pri Komitatanoj B komencita

Unuafoje en la historio de UEA, la membroj povos voĉdoni rete en "via spaco" en la retejo de UEA. [...]

N-ro 801 (2019-05-10)

Elektaj en UEA

La Elekta Komisiono de UEA serĉas kandidatojn por la Estraro de UEA kaj por la postenoj de Komitatano C, Komitata revizianto kaj por la Komisiono pri Financo. [...]

N-ro 800 (2019-04-28)

UEA 111-jara: Vivanta asocio por vivanta lingvo

(adaptita kaj koncizigita el parolado de D-ro Mark Fettes, la Prezidanto de UEA, en la 50-a Malferma Tago)

Hodiaŭ, la 28-an de aprilo, UEA festas sian 111-an naskiĝtagon. Bela okazo por pripensi ĝian signifon por la Esperanto-movado. [...]

N-ro 799 (2019-04-27)

2018: grandioza rezulto ĉe donacoj por UEA

En 2018 multaj membroj malavare donacis al la Asocio. Jam nun eblas diri, ke la jaro 2018, [...]

TEJO



TEJO

partoprenis la Tutmondan Festivalon pri

Agado rilate al la Celoj por Daŭripova Evoluigo

Delegacio de TEJO partoprenis la Tutmondan Festivalon pri Agado rilate al la Celoj por Daŭripova Evoluigo (SDG Global Festival of Action) en Bonn, Germanio. [...]

Intervjuo al Michael Boris Mandirola, kandidato al la Komitato de UEA

Michael Boris Mandirola estas unu el la kandidatoj al la Komitato de UEA. Ni faris al li kelkajn demandojn pri lia kandidatiĝo kaj pri la kunlaboro inter TEJO kaj UEA. [...]

Malferma alvoko – TEJO-estraranoj 2019/20

La Elekta Komisiono de TEJO serĉas kandidatojn por la Estraro de TEJO, por oficperiodo ekde la 1-a de septembro 2019 ĝis la 31-a de aŭgusto 2020. [...]

Partoprenu nome de TEJO konferencon de UNOY en Kolombio

Alvoko por amerikanoj: Partoprenu nome de TEJO konferencon de UNOY en Kolombio. La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO serĉas kandidatojn por partopreni la konferencon de UNOY (United Network of Young Peacebuilders) en Bogoto, Kolombio, inter la 15-a kaj 18-a de julio 2019. [...]

Nova numero de Revuo Kontakto – Menstruo-Tabuo. Kiam ĉesos la kondamno?

Jen la nova numero de Revuo Kontakto – la ĉeftemo de la numero estas Menstruo-Tabuo. Kiam ĉesos la kondamno? [...]



Leteroj de niaj legantoj



Karaj,

La ĵus alveninta nr 41 estas aparte interesa pro ties varieco kaj kontribuaj seriozaj. Min atentigis preskaŭ ĉiuj tiuj, sed povas esti ke

ĉiu trovas en ĝi ion atraktivan.

Dankon

Bardhyl Selimi el Albanujo



Estimata,

Koran dankon por via sendo de la Maja Turka- Stelo! Mi estas tre ĝoja vidi mian artikolon. Tre dankon!

Mi volas poste sendi "La historion de Japania Granda Sumoo".

Ĝis revido!

Kacu MATOBA el Japanio

Granda ŝanco: la malnova UEA finiĝadas kaj la nova estas reinventenda

-- el la Balta Ondo

La historio de nia UEA de 1908 ĝis nun havis plurajn periodojn, el kiuj ni memorigu almenaŭ la svisan, la anglan kaj laste la nederlandan. Fakte de 1955 la sidejo de UEA restis en Nederlando. La movo al Roterdamo el la angla kamparo en 1955 certe fontis el saĝa decido, kaj dum la tuta periodo de Lapenna, la plej forta personeco de tiuj jaroj, ĝis la komenco de la 1970aj jaroj la asocio ĝuis periodon de kresko en trankvila lando, politike stabila kaj socie moderna. Sed jam en la 1970aj jaroj kaj pli klare ekde la komenco de la 1990aj komencis aperi signoj de ŝanĝiĝo de la mondo kaj de problemoj por idealismaj asocioj.

De 1991 la membronombro daŭre malpliĝis. Tamen pro la granda kapitalo akumuliginta oni ricevis renton, kiu kompensis la malmultiĝon de la membroj kaj la altiĝon de la kostoj, tiel ke oni povis plu vivi trankvile kaj liveri la samajn servojn. En la lastaj jaroj ŝanĝiĝis ankaŭ la kondiĉoj de rentoj pagitaj de bankoj, kiuj en Eŭropo praktike emas nuligi. Sekve la ekvilibro finfine rompiĝis kaj oni devis konstati, ke ne plu eblas pagi la salajrojn por liveri la samajn servojn. Tiu konstato oficiale aperis en ĉi tiuj monatoj, kiam la estraro provis starigi la buĝeton por la venonta jaro kaj rimarkis, ke ne eblas malpliigi la deficiton (alivorte, la uzon de la kapitalo por normalaj elspezoj) al la nivelo, kiun komitatanoj postulas. Estis multaj diskutoj pri tio dum la 103a Universala Kongreso en Lisbono pasintjare. En la fino oni decidis, ke la deficitita nivelo de rondcifere 150 000 eŭroj en unu jaro ne plu estas longe eltenebla, kaj ke oni devas komenci duonigi ĝin en 2020 kaj poste entute forigi ĝin.

Antaŭ tiu dilemo la estraro decidis, ke oni devas malpliigi la kostojn por salajroj. Ĝi decidis apliki nederlandan leĝon, kiu permesas al entreprenoj en kriza situacio renegoci la salajrojn kun la dungitoj, praktike malaltigi ilin, se la dungitoj akceptas. Se la dungitoj ne akceptas, juĝisto decidas.

Temas evidente pri tre dolora decido, kiu eventuale ne estos la sola dolora decido bezonata. Ĝi certe signifas la finon de la nederlanda periodo de UEA, ĉar

tenado de tia impona oficejo en unu el la plej multekostaj urboj de la mondo ne plu estos ebla por movado, kiu altiras ĉiam malpli da membroj.



Ĉu de Roterdamo al Slovakujo survoje al Samarkando?

La estonta UEA estas reinventenda. Sed kial? Ĉu ni vere bezonas tutmondan kunordigan organizaĵon? La retaj manuloj pensas, ke ne, ke la granda reta frato sufiĉas por ĉio. Mi kredas, ke jes, ĉar nia movado ankoraŭ ne atingis siajn celojn, kiuj estas la samaj celoj de Zamenhof: ĝeneraligi la uzon de Esperanto por faciligi kaj justigi interpopolan interkompreniĝon. Ni estas movado, kiu diras al la mondo ion, kion la mondo ne volas aŭskulti: Ne faru militojn, ne mortigu homojn, sed provu kompreni kaj esti justaj; Ne ekzistas fortuloj kaj sekvantoj; Ni ĉiuj estas egalaj. Ni devas kunordigi nian agadon tra la mondo por pliefikigi tiun agadon.

Kiel reinventi nin? Simple per komuna prudento kaj per agnosko de niaj fortoj (miloj da dediĉitaj homoj, kiuj senpage aŭ eĉ mempage laboras por niaj idealoj) kaj niaj malfortoj (neniu registaro, neniu privilegiulo, neniu riĉulo iam ajn helpas nin). Pro tio ni mem devas krei daŭripovan sistemon. Ni devas utiligi la modernajn retajn ilojn por minimumigi la administran laboron kaj liberigi energiojn por la esenca homkonvinka laboro. Ni devas lerni labori per tre malpeza strukturo kaj per multaj volontuloj subtene al la homoj, kiuj tra la mondo faras la bazan informan kaj instruan laboron.

Samarkando certe estas urbo pli malmultekosta ol Roterdamo, sed antaŭ ol iri tien ni devas funde reinventi nian administradon. Ĉu por tio survoja lando kiel Slovakujo povus helpi nin reinventi nin mem?

Kiu kulpas?

Nun ne estas momento serĉi kulpulojn, sed estas momento por kunlabori, ĉiu laŭ siaj kapabloj, por utiligi ĉi tiun ŝancon inventi la estontan UEA-n. Estus tre maldanke kulpigi la nunan estraron kaj la nunan

ĝeneralan direktoron pro io, kio havas siajn radikojn en la pasinteco.

Cetere, ni ĉiuj kulpas. La nuna kaj la antaŭaj estraroj, kiuj vivis retorike kaj kontente kaj ne rimarkis la problemon, la nuna kaj antaŭaj komitatoj, kiuj kondukis kiel kverelemaj parlamentoj vivantaj for de la popola realo. Kaj ĉefe mi mem kulpas, ĉar kompreninte la malekvilibron en la jaro 2001a, mi ne sukcesis komprenigi al la aliaj, ke ni iras renkonte al la nuna situacio.

Sed kiel diras la titolo de ĉi tiu artikoleto, temas pri granda ŝanco krei ion, kio estos vivipova dum la tria jarmilo. Ek al la laboro!

Renato Corsetti

Fonto: **La Balta Ondo** <http://sezonoj.ru/2019/05/corsetti-2>

BEL - Konferencoj 2019

La oka eldono de la jam tradiciaj BEL-Konferencoj okazis je la 19-a kaj 20-a de aprilo 2019, en la urbo Pouso Alegre, brazila ŝtato Minas Gerais. La tuta evento, sub la aŭspicio de Brazila Esperanto-Ligo kaj Asocio Esperantista de Rio-de-Janejro estis granda sukceso. Sub la mirinde detala organizo de la lokaj aktivuloj, geedzoj Fábio kaj Liene Silva, en bonegaj instalaĵoj en la Kulturcentro Cleonice Bonillo Fernandes, kvindekda homoj el dek tri urboj ĉeestis kaj aktive pridemandis la prelegintojn pri la jenaj temoj:

- Alternativaj fontoj de energio (Saulo Wanderley)
- La homo kaj la rido (Mauro Progiante)
- Rotario Internacia (João Veiga)
- Eldonprojekto "Nia Juvelaro" (José Tenório)
- Reenkarniĝo (Joel do Ó)
- Nigraj truoj en niaj hejmoj: kio post la necesujo? (Allan Argolo)
- Dulingva edukado de infanoj (Ísis Piton)
- Kultivado de orkideoj (Francisco Wechsler)
- La magio de kinoarto (Joe Bazílio)
- Poezio surbloge loĝas (Paulo Nascentes)

La sinsekvon de la 40-minutaj prelegoj ĉiam sekvis 20-minuta vigla diskuto kun la publiko, tiel ke foje mankis tempo por kelkaj pliaj intervenoj. La prezento de prelegantoj kaj organizado de diskutoj estis klare, sprite kaj kompetente farita de Prof-ro Paulo Nascentes.

En la vendreda vespero okazis artaj prezentoj.

sendis Dr Paulo Sérgio Viana, el Brazilo

Loka ensemblo prezentis plurajn tradiciajn brazilajn muzikaĵojn; la veterana, populara Esperantisto Amarílio Carvalho deklamis kelkajn poemojn; kaj Ísis Piton, kune kun sia denaske Esperanto-parolanta filino kantis kelkajn kanzonojn, akompane de gitaro.



Dum la tuta evento funkciis sufiĉe varia libroservo, krom budoj por ĉemizoj kaj Esperantaĵoj. En paŭzoj inter prelegoj, la tuta publiko povis bonguste lunĉi, tute senpage.

La BEL-Konferencoj 2019 bele plenumis siajn celojn: ĝi estis kleriga, amikiga, bonetosa, kulture altnivela kaj amuza.

sendis **Dr Paulo Sérgio Viana** el Brazilo



Esperanto proponita kiel "Nemateria kultura heredaĵo" ankaŭ en Slovakio

-- el la Balta Ondo

La 29an de marto 2019 SKEF (Slovakia Esperanto-Federacio) sendis oficialan proponon al la Nacia instituto (apartenanta al la Ministerio de kulturo) por enskribi Esperanton en la Slovaka listo de la nemateria kultura heredaĵo. La titolo de la propono estas: "Jazyk esperanto – nositel' slovenskej a esperantskej kultúry" (La lingvo esperanto – portanto de la slovaka kaj Esperanta

kulturoj).

La proponon akceptis kaj subskribis krom SKEF ankaŭ ĉiuj lokaj Esperanto-kluboj/organizoj kaj Slovaka Esperanta Junularo. Nun oni detale esploras la proponon, eventuale faros pliajn demandojn, postulos pliajn dokumentojn ktp. Fine de la jaro 2019 oni devus informi pri la akcepto, eventuale malakcepto de la propono. La proponon jam anticipe subtenis



kelkaj gravaj slovakaj politikistoj. Ni esperas, ke la propono estos pozitive taksita de la pritaksantoj kaj de la ministrino de kulturo, kiu havas finan, decidan voĉon.

Okaze de sukceso Slovakio iĝus la tria lando (post Pollando kaj Kroatio), kie Esperanto estus ĉi tiel agnoskita – kaj tio jam donus rekte la eblon, proponi Esperanton kiel mondan heredaĵon de Unesko! Tio jam estus vere granda atingo, nepre indas provi ĝin kaj esperi pri ties sukceso!

Ankaŭ en Litovio nun okazas preparoj por proponi Esperanton kiel kulture heredaĵon en ĉi tiu lando.

Peter Baláž (Petro)
prezidanto de SKEF

Fonto: **La Balta Ondo** <http://sezonoj.ru/2019/05/slovakio-25>

Rabindranath Tagore



Antaŭ 158 jaroj, la 7-an de majo 1861, naskiĝis Rabindranath Tagore, bengala poeto kaj filozofo, krome ankaŭ muzikisto kaj pentristo. Li estis tuffakulo kaj unu el ĉefaj kleruloj en Hindio fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj.

En la vivo kaj verko de Rabindranath Tagore esprimiĝas homa nobleco kaj grandeco de eterna valoro. Lia vivoverko vere estas frukto de hinda kulturo - pasinta kaj moderna. Serioza studado de lia verko kaj vivago certe faciligos komprenon de nuntempa Hindio.

Li estas mondfame konata reprezentanto de la bengallingva literaturo de la 20-a jarcento, ankaŭ en propra lando tre populara. Tradukante parton el siaj verkoj al la angla lingvo, li kreis ponton inter la kulturoj de Azio kaj Eŭropo. Tagore, kiu interalie verkis kaj komponis la nacian himnon de Barato kaj Bangladeŝo, en la jaro 1913 gajnis la Premion Nobel de Literaturo kaj estis la unua neeŭropano kiu atingis tion.

Fonto: <https://www.facebook.com/EsperantoInstituto/photos/a.184737078381622/1038756806312974>

LA JUNA PRINCO

Ho patrin', la juna princo iros preter dom' solene —
Kiel povu mi atenti pri laboro ĉi matene.

Montru, ke mi harojn miajn kiel ligu, kiel plektu,
Ho patrino, diru al mi, kiun veston mi elektu?

Panjo, kial miras vi min? Scias mi, ke li ne sendos
Eĉ rigardon al fenestro, kie je li mi atendos.

Post moment' el mia vido li forpasos senrevene
Nur la flut' el malproksimo sendos al mi ĝemon svene.

Sed la juna princo iros preter nia dom' solene...
Kaj mi veston plej ornaman tial prenos ĉi matene...

Ho! patrin', la juna princo iris preter dom' kun brilo,
Leviĝanta suno brilis de sur lia veturilo.

Kaj vualon mi forŝovis, ŝire mi de kol' malligis
Rubenĉenon mian kaj sur lian vojon ĝin faligis.

Panjo, kial miras vi min? Scias mi: li ĝin ne levis,
Restis sanga gut' sur vojo, kie ĝi sub rad' diskrevis.

Kaj neniuj konjektas, kaj neniuj eksciuj,
Kio estis la donaco, kaj de kiu kaj por kiu.

Sed la juna princo iris preter nia dom' ĉi fojon
Kaj juvelon de la brusto jetis mi sur lian vojon.

Fonto: https://eo.wikisource.org/wiki/La_juna_princo

ĈIO PRI EVE

En la kuliso; Fama teatra aktorino. Post la teatraĵo, ŝi babilas kun la dramisto, lia edzino kaj kun ŝia verdira, vireca asistantino. Ŝi ne multe respektas la spektantaron. "Ili estas nenies adorantoj. Homoj por la reedukejo. Ili apartenas al nenies spektantaro." ŝi diras. La edzino de la dramisto diras "jam estas iu, tia en la salono..." kaj venigas Eve Harrington al la kuliso, kaj konatigas ŝin.



La kampara junulino, timinda, iritita, kun raŭka voĉo, rakontas sian vivon al nia "primadonna" kaj al la aliaj, rakontas pri sia pasio por la teatro kaj pri sia admiro al nia "primadonna". Tamen ĉi tiu rakonto ne ŝajnas konvinka nur al sincera Birdie, la asistantino de la aktorino. Ŝi ne multe ŝatas ŝin.

Post tiu nokto, la kamparanino fariĝas la plej granda helpanto de la fama aktorino Margo Channing. Ŝi zorgas pri ĉiu ŝia laboro. De asistanteco en la teatro ĝis la ĉiutagaj fendaĵoj... Ŝi kontraŭstaras al la homoj kun antaŭjuĝo en la teatra rondo, homoj, kiuj malestimas ŝin. Ŝin nur protektas Karen, la edzino de la dramisto. Post multaj kontraŭbataloj Eve sursceniĝas, en la loko de Margo kaj ludas la ĉefan rolon verkitan por ŝi. Ĉiuj aprezas ŝian sukceson. Ni poste spektas ŝian sukcesan, batalantan vivon, kiu etendiĝas de Broadway al Holivudo.

Ĉi tiu estas la unua scenaro.

La dua scenaro estas kiel jene: La juna kamparanino vagadas de urbo al urbo kaj sekvas ĉiun teatraĵon de la fama aktorino Margo Channing. Sed kiel ŝi sukcesas fari tion kvankam ŝi estas malriĉulino? Ŝi spektas la teatraĵojn starante, sen pagi monon por seĝo. Ŝi postsekvas la faman Broadway stelulinon, kaj aŭskultas ĉiun replikon verkitan de la fama dramisto Lloyd Richards. Ŝi estas tia teatro-amanto. Ŝi estas filino de malriĉa farmisto.

Ŝi havas ordinaran vivon. Ŝi, estante sekretariino

en bierfarejo, komencis ludi en malgranda teatro-grupo. Ŝi konatiĝis kun viro nomita Eddie. Eddie estis piloto kaj mortis dum la Dua Mondmilito. Poste la sola Eve provis treni sian vivon kun la salajro ŝi heredis de Eddie. Ŝi moviĝas de San-Francisko al Novjorko. Ŝi trovas sin nekompetenta, sed ŝia pasio por Margo Channing kaj por la teatro kondukis ŝin ĉi tien. Fakte, ŝi ne havas planojn fariĝi stelo, sed Addison, la teatrokritikisto, provas allogi ŝiajn pensojn. Li finfine sukcesas, kaj la ruza, kalkulema Addison provas per ĉiu maniero krei stelon el ŝi. Eve, sorĉita de la viro, senintence subpremas ĉiujn siajn geamikojn. Ŝi estas stelo, ŝi ricevas premiojn, sed ŝi havas malfeliĉan rilaton. Ŝi transdonas sin al alkoholaĵoj kaj finfine sinmortigas.

Kio pri la tria scenaro? Pli precize, kio pri la vera scenaro de la filmo?

La filmo malfermiĝas kun premio ceremonio. Okazaĵoj, disvolviĝos el la fino al la komenco. La teatro kritikisto Addison DeWitt komencas fari klarigojn pri la teatra akvario - jen mia komparo. Li mem estas tiu, kiu nutras sin de ĉi tiu akvario, kaj kiu ne volas forlasi ĝin. Post sia priskribo de la medio li enkondukas Eve kaj la aliajn karakterojn. Tiam ni reiras al la unua nokto de konatiĝo. La nokto kiu fajrigis ĉion...

Sed mi ne plu daŭros. Ĉar mi volas, ke vi mem spektu kaj surpriziĝu de ĉi tiu fikcia dramo de Joseph L. Mankiewicz, kiun li verkis kaj direktis. Tiuj, kiuj jam spektis la filmon, eble rerigardos al ĝi per novaj okuloj. Ekzemple, mi spektis ĝin trifoje kaj trovis la finan scenon troigan. La sinteno de Phoebe en la hotela ĉambro de Eve, kie ŝi montras sian pasion por fariĝi stelo estis troiga. Mi pensas, ke Mankiewicz adoptis tian teatran stilon por la fina sceno. La bildo de Phoebe, reflektita en enkorpigitaĵaj speguloj, eble provas montri, ke estas centoj de tiaj homoj en ĉi tiu stelrondo.

La agado en la filmo estas sindetena kaj majstrecita. Anne Baxter desegnas belan portreton de Eve, kiu estas inda rolo por tiu scenaro. Bette Davis, George Sanders, Celeste Holm, Gary Merrill, Hugh Marlowe, Gregory Ratoff, Thelma Ritter (la patrino en la filmo La Birdisto de Alcatraz) kaj fine Barbara Bates kiu domaĝe sinmortigis en la aĝo de 43. Marilyn Monroe ankaŭ mallonge rolis en ĉi tiu filmo. Mi pensas, ke ĝi estas eksterordinara stabo!

Mi ne memoras la aliajn filmojn de Mankiewicz, sed la drama intrigo de tiu filmo tre bone taŭgas al ĝia scenaro. La direktoro ekvilibras inter troigo kaj



Destino! Jen unu ankoraŭ mistero de la homa vivo, pri kiu oni multon diras, sed malmulton komprenas. Ĉu ia supernatura forto? Ĉu ies neeksplikebla antaŭdecido? Kio?

La antikvaj Helenoj kredis, ke estas tri diinoj, tri fratinoj nomataj Parcoj (Μοίραι), kiuj esprimas tiun nekonkretan ideon, kiun ni nomas destino. Tiuj diinoj difinas la sorton de la mortemuloj. La unua, Klotoa (Κλωθώ), difinas la vivdaŭron, la dua, Lañesa (Λάχεσις), tranĉas la fadenon de la vivo kaj la tria, Atropa (Ατροπός), difinas la sorton de la homoj. Neniu forto povas ŝanĝi la decidojn de tiuj ĉi diinoj, do, la homoj povas nur akcepti rezignacie ĉion, eĉ la plej malfeliĉigajn, malbonŝancigajn eventualaĵojn.



Mi pensas pri ĉio tio ĉi nun, ĉar mi deziras rakonti malĝojigan historion, tiun de Edipo, la plej karakteriza viktimo de la terura destino.

Edipo estis filo de reĝo. Tamen, lia tre malfeliĉa sorto estis difinita antaŭ lia naskiĝo. Lia tre juna patrino, la reĝino lokasta (λοκάστη) estis graveda, kiam ŝia edzo, Lajo (Λάιος), la reĝo de Tebo (Θήβα aŭ Θήβαι) ricevis orakolon, laŭ kiu, al la filo kiun li akirus, estis destinite mortigi sian patron kaj edziĝi kun sia patrino. Estis ja orakolo ekstrapaganca, tamen Lajo, kiu sciis, ke malnova dia malbena ŝarĝis lian genton, kredis ĝin kaj kiam la bebo naskiĝis, li liveris ĝin al fidela servisto, kiun li ordonis, irigi kaj forlasi ĝin al fora, sovaĝa, monta loko. La servisto, homo fidela sed bonkora, obeis, tamen tute nevolonte. Kiam li atingis lokon taŭgan por lasi la bebon, li renkontis fremdajn ĉevalpaŝtistojn el Korinto (Κόρινθος), kiuj, aŭskultinte la tutan historion, petis de la servisto, doni al ili la bebon kaj diri al sia mastro, ke li plenumis lian ordonon. Tio, ja, okazis, kaj kiam la korintaj ĉevalgardistoj revenis al Korinto, sin prezentis al la loka reĝo Polibo (Πόλυβος), ili montris la kondamnitan bebon kaj rakontis al li ties aventuron. La kompatema,

tre bonkora, seninfana kaj pro tio malfeliĉa reĝino, Peribia (Περίβια), vidante tion kiel dian signon kaj donacon, plorante petis de sia edzo, ke ili alprenu kiel sian filon la belegan bebon kaj tio estis farita. La bebo estis donita de Lajo al sia servisto ŝnurligita je la piedoj. Pro tio, kiam ĝiaj novaj gepatroj ĝin prenis, ĝi havis edemojn je la piedoj. De la helena vorto “edemo” (οίδημα) kaj de la vorto “piedo” (en la helena “πους” <pus>), elvenis la donita al la bebo nomo Edipo (helen-prononce “idipus”).



Edipo vivis feliĉe, ĝuante la amon kaj prizorgadon de siaj gepatroj, li grandiĝis glate kaj iĝis bela, brava, inteligenta, tre bonkondukta junulo. Li sciis nenion pri sia vera deveno, ĝis kiam, en ordinara lerneja disputo, iu kunlernanto nomis lin “bastardo”. Reveninte hejmen, li demandis pri tio sian patrinon, kiu tamen ŝajnis kvazaŭ ŝi nenion komprenas, kaj Edipo, post nelonge forgesis tiun incidenton. Post kelkaj jaroj, kiam li vizitis la divenejon de Delfoj (Δελφοί), interalie li petis konsilon, rilate al sia familio kaj patrujo. Tute surprizite li aŭdis la teruran orakolon, laŭ kiu, se li revenus al sia patrujo, nepre li mortigus sian patron kaj edziĝus kun sia patrino. La junulo sentis hororon, pensante ke li povus fari tiajn teruraĵojn, do, li decidis ne reveni hejmen kaj komencis vagadi, vizitante diversajn lokojn de Helenujo.

Unu tagon, tiu lia vagado kondukis lin al la regiono de Tebo, kaj kiam li estis sur mallarĝa punkto de kampara vojo, venis de la kontraŭa direkto granda kaleŝo de nobelo, akompanata de kvin armitaj sekvantoj. En la kaleŝo estis Lajo, la reĝo de Tebo, kiun Edipo ne konis, do, li miris vidante ke tiu viro, indigne kriaĉante, per maniero neakceptebla insulta, ordonadis lin fortiriĝi de la vojo. Edipo, kiel reĝido alkutimiĝinta al traktado afabla kaj kompleza, ekkoleris kaj minace proksimiĝis al la kaleŝo por ion diri, sed, la malafabla nobelo levis bastonon kaj neatendite batis lin sur la ŝultron. Tio estis ofendo nepardonebla, do, Edipo eltiris la glavon, fulme trapikis kaj mortigis la impertinantan fremdulon. Tuj poste, per nur kelkaj glavobatoj li mortigis la reĝajn sekvantojn, kiuj provis lin ataki, kaj nur unu servisto povis sin savi forkurinte. Edipo estis trankvila, li sciis ke li ne faris murdon, li nur defendis sin kontraŭ atakintoj, do, li daŭrigis sian vagadon. Tamen, tiele, la orakolo estis duone pravigita, Edipo estis mortiginta sian patron.

La morto de Lajo estis ne la sola malbono, kiu trafis Tebon. En la lando regis funebro, sed ankaŭ maltrankvilo kaj timo, ĉar terura monstro estis sin

lokita ekster la ĉefurbo kaj tial la homoj povis nek eniri nek eliri el la lando. Tiu homovora monstro estis Sfinkso (Σφινξ), estaĵo kontraŭnatura, nevundebla, kiu havis leonan korpon kaj voston, kapon kaj bruston virinajn kaj flugilojn de vulturo. Tiu Sfinkso devigis la homojn, kiuj aŭdacis alproksimiĝi al ĝi, solvi malklarajn, tre malfacilajn enigmojn kaj tiujn, kiuj ne kapablis ilin solvi, ĝi mortigis kaj voris. Laŭ dia orakolo, tuj kiam iu ajn homo respondus ĝuste al tia sfinksa enigmo, la abomena monstro falus en profundan krutaĵon kaj pereus. Estis pro tio, ke Kreono (Κρέων), la frato de la vidva reĝino, kiu post la morto de Lajo iĝis regento, deklaris, ke la viro, kiu liberigus la civiton de la daŭra malfeliĉo, akirus la reĝan sceptron kaj edziĝus kun la belega, vidva reĝino, lokasta. Multaj bravaj viroj reagis al la stimulo, ili kuraĝe sin oferis, ili provis alfronti la monstron, tamen ĉiuj iĝis ties voraĵo.



La alloga informo atingis ankaŭ Edipon, kiu tiam estis en najbara civito, kaj ĉar li posedis ne nur kuraĝon, sed ankaŭ neordinaran spritecon, senhezite decidis kontraŭstari al la monstro. Kiam li atingis la danĝeran lokon, Sfinkso sin prezentis, malpermesis al li la aliron, kaj per tondra voĉo metis al li enigmon. La terura aspekto de la monstro ne timigis Edipon, sed la enigmo ŝajnis al li malfacila. “Kiu estas la

estaĵo, kiu la matenon havas kvar piedojn, la tagmezon du kaj la vesperon tri kaj moviĝas pli bone tiam kiam li havas la pli malmultajn piedojn?”. Tiu estis la enigmo, antaŭ kiu Edipo restis iom embarasiĝinta kaj silenta. Tamen, la momenton, kiam Sfinkso estis preta lin kapti per siaj ungegoj, li kriis: “la homo!”. La monstro tuj detiriĝis, terure ĝi roris, ululis kiel cent leonoj kune, kaj kiam Edipo aldonis: “kiam li estas bebo moviĝas lante, helpe de piedoj kaj manoj, poste li staras kaj paŝas tute libere per siaj du piedoj, kaj kiam li maljuniĝas, li iras malfacile, helpe de bastono!”, la monstro falis kun bruo en la senfundan krutaĵon kaj malaperis.


Estas kompreneble, ke Edipo estis akceptita en Tebo kiel heroo kaj liberiginto. Estis solene oferita al li la reĝa trono kaj la iom pli aĝa, sed belega lokasta, kun kiu li edziĝis en brila ceremonio kaj kelk-taga

publika festado. Nun la orakolo estis tute pravigita, Edipo estis edziĝinta kun sia propra patrino, do li estis kulpa pri patromortigo kaj incesto!

Li iĝis reĝo de Tebo kaj li estis reganto tre bona, justa, pacama. Li vivis feliĉe kun sia amata edzino kun kiu li akiris du filojn kaj du filinojn. La popolo amis sian reĝon kaj dum multaj jaroj ĉio en la civito iris glate. Tamen, iam, sinsekvaj malfeliĉoj komencis ataki la landon. Estis unueaperintaj, nesanigeblaj malsanoj, kaj estis longa, daŭra senpluveco, tuta sekeco, kaj estis neeksplikebla morto de brutoj, post nelonge estis inanicio. La popolo suferis, ĉio montris, ke se tiu malfeliĉo ne ĉesus, la tuta lando baldaŭ estus tute detruita. En la palaco regis maltrankviliĝo, la reĝo kaj ties konsilantoj, korteganoj, nobeloj, pastroj, estis en daŭra interkonsiliĝo, tamen solvo ne estis trovata. La daŭra klopodado de la pastroj el ĉiuj sanktaj temploj, la sinsekvaj ritoj, ceremonioj, sanktoferoj, nenion oferis. La fino ŝajnis tute certa, definitiva. Tamen, la lastan, plej krizan momenton, orakolo donita de la neerarema divenejo de Delfoj portis kelkajn esperojn. La dio diris, ke la mortiginto de Lajo, viro ŝarĝita de teruraj pekoj, vivas kaj prosperas en Tebo. Do, nur kiam la Tebanoj trovos kaj forpelos la krimulon, la urbo estos liberigita de la dia puno.

Edipo, ankoraŭfoje invitis al kunsido la alt-rangulojn de la ŝtato kaj ordonis, ke oni faru tre atentajn kaj metodajn esplorojn kaj vastan enketadon por trovi la misteran krimulon. Centoj da personoj, sub la sendorma pririgardo de la reĝo mem, komencis longan, penigan esploradon. Ĉiuj sciis, ke Lajo estis mortigita de nekonata fremdulo, tamen, kelkaj ekmemoris ke unu el la sekvantoj de la reĝo estis savita. Oni ŝercis pri tiu homo, kiu vivis malproksime de Tebo. Heroldoj estis senditaj al ĉiuj direktoj, abunda mono estis oferita al la afero, tiele la homo estis trovita kaj kondukita al la reĝa palaco. Tiu homo, ne rekoninte post tiom da jaroj Edipon, rakontis al li detale la fatalan okazintaĵon kaj tiam, Edipo komencis ion suspekti, sed, preskaŭ tuje, li trankviliĝis aŭdinte de maljuna pastro, ke, laŭ nekontestebla, sekreta orakolo, al Lajo estis destinite morti de la mano de sia propra filo. Edipo sciis bone kies filo li estas, krome, ĉiuj en Tebo sciis, ke la sola infano de Lajo estis mortinta dum la akuŝo, do, tute trankvila, petis pri pliaj esploroj. Tiam, sin prezentis nova atestanto, la servisto kiu estis komisiita de Lajo mortigi lian filon. Li rakontis plorante ĉion pri sia malobeo, pri la nekonataj fremdaj savintoj de la bebo kiuj irigis ĝin al Korinto, kaj tiam Edipo memoris sian junulan disputon kaj la strangan parolon de lia kunlernanto. Koincide, ĝuste tiam, atingis Tebon reprezentantaro de la Korintanoj, kiu anoncis al Edipo la morton de lia patro, Polibo, kaj

la deziron de liaj samlandanoj reveni al sia patrujo kaj iĝi ties reĝo. La Korintanoj informis lin, ke Polibo mortis post longa malsano, kaj tio estis la fina, fatala pruvo por Edipo, li, ja, ne estis filo de Polibo! La tuta vero estis malkovrita al la malfeliĉa Edipo. Ŝajnis al li, ke la doloro kaj malfeliĉo de la tuta homaro falis sur lin. Lia amo por la suferanta teba popolo, lia honesteco kaj justa konscienco devigis lin konfesi publike, ke li estas la ŝercata persono, la senkonscia krimulo, mortiginto de sia patro kaj edzo de sia patrino. Li malkovris ĉion, li rakontis detale sian tutan tragedian historion kaj sin metis je la dispo de la civito.



Iokasta, aŭdinte ke ŝi estas edzino de sia filo, en nepriskribebla, senmezura ŝoko, en stato freneza, kuris en sian apartamenton kaj tie sin pendumis per sia skarpo. Tie trovis ŝin Edipo, kiu, neelteninte tioman malfeliĉon,

ekkaptis la agrafon de sia edzino kaj sin blindigis je ambaŭ siaj okuloj. La nekonsciebla tragedio estis tute plenumita.

Tebo devis esti savita, la malbenita Edipo devis esti forpelita. Neniu kompatis la blindulon, markitan de tia dia maljustaĵo. Eĉ liaj propraj filoj ne etendis al li la manon. Helpate nur de sia bonkora, afablanima filino Antigona (Αντιγόνη), komencis senĉesan vagadon. Li estis neforviŝebla markita, malbenita de la dioj, do, neniuj civito akceptis lin, ĉiuj lin forpelis. Nur en Ateno (Αθήνα aŭ Αθήναι) estis oferita al li azilo, de la reĝo Tezeo (Θησεύς). Estis oferita al li azilo, tamen la plej malfeliĉa homo de la tuta mondo bezonis nur lokon por pace morti. Tion nur petis de Tezeo, kaj tio estis donita al li. Li mortis en angulo de sankta parko de Atena (Αθηνά) kaj nur Tezeo sciis kie estas lia tombo. Tio estis la lasta peto de Edipo kaj la promeso de Tezeo, kiu respektis kaj tenis la sekreton. Oni diradis, ke pro tiu sinteno de Tezeo, Ateno iĝis la plej glora ŝtato de la tuta Helenujo.

Kion mi diru? kion mi aldonu? Foriris Edipo kaj lasis al ni, en la eterneco, la maljustan makulon: "edipa komplekso". Tamen, mi kredas, ke li lasis al ni ne nur tion, sed ankaŭ motivon por ia nia konsolo, en

momentoj malfacilaj, kiam malfeliĉo atakas nin. Ni memoras, ke ĉiam estas io pli peza, pli suferiga ol tio kion ni spertas, eble tiam ni memoras, kun ia simpatio kaj kompatio, la malfeliĉan Edipon.

Mi diru ankaŭ, ke la nomo de Edipo ne estis donita al konstelacio, ĝi estis donita, mi ne scias kial, nur al specio de akridoj (oedipodus).

Tamen, honoris lin per multaj, eterne vivantaj, unikaj art-verkoj la plej renomaj, ĉiakampaj artistoj de ĉiuj epokoj. Mi komencu de la tri plej grandaj, senmortaj, helenaj tragediistoj, Eŝilo (Αισχύλος), Eŭripido (Ευριπίδης), Sofoklo (Σοφοκλής) kaj de ok ankoraŭ grandaj antikv-helenaj poetoj-dramistoj. Sekvis gigantaj, ne helenaj kreintoj (Atio, Seneko, Kornelio, Racino, Voltero, Dryden, Ducis, k.a.), kiu, inspirite de la edipa dramo, postlasis miraklajn poeziajn kaj dramajn majstraĵojn. De la poetoj la stafetbastonon ricevis plej grandaj, tutmonde konataj muzik-komponistoj (Sacĉini, Mendelson) kaj pentristoj (J.Ingres, G.Moreau); Tute vere, la arto sin klinas antaŭ Edipo. Ĉu tio sufiĉas al li? kiu scias?

--- el GEMOJ EL LA HELENA HISTORIA KAJ MITOLOGIA TREZORO

Verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo

Tribalismo

Ho Tribalismo, kie vi venas?
Vi, malbona spirito
Tribalismo en la lernejo, estas Afriko!
Tribalismo en la hospitalo, estas la nigra!
Tribalismo en la preĝejo, estas la nigra!
Tribalismo en la oficejo, estas la sudano!
En la demokratio, ili mortigas unu la alian, afrikanoj
Eĉ en geedzeco, oni lokas la fratojn,
Eĉ en la milito, la fronto estas la aliaj
Eĉ en malliberejo, oni eskapigis la amatojn,
Kaj Afriko retroiras, kaj Afriko defalas
Sed iuj kuraĝaj malgrandaj nigruloj antaŭeniras
Kaj Ĉinujo, kaj Brazilio emerĝas
Sed iuj malriĉaj afrikanoj organiziĝas kaj antaŭeniras
Ili admiras Pastoron Martin Luther King,
Nelson Mandela
Kaj serĉas alian Senghor
Vi Tribalismo, iru hejmen

Ŝlosu mem
Ĉar Kongo volas konduki Afrikon.



verkis kaj sendis **Honoré Sebuhero** el DR Kongo

Kun Amo en la Koro

Ivaniĉka Maĝarova, mia amikino el urbo Razgrad, Bulgario, estas vigla virino, plena kun fortoj, ĉiam ridema kaj preta helpi al ĉiu. Kune kun la zorgoj pri siaj familianoj, ŝi estas aktiva esperantistino. Ekde 1989j, jam 30 jaroj, ŝi sin dediĉas al la laboro en la Esperantista Domo de Kulturo “Doktoro Ivan Kirĉev”, Razgrad, komence kiel sekretarino, poste kiel prezidanto kaj



nun vicprezidanto de la Domo.

Ekde 2000 j., dum du mandatoj – dek jaroj komune, ŝi estis senatorino en la Senato de “Esperanta Civito”.

Virino, kiu ne restas sen laboro, ŝi sukcesis verki kaj eldoni librojn kun poezio kaj rakontoj:



-- “Vi kaj Mi”- dulingva libro kun felietonoj, 2000.

-- “Kargo sur kasko”- dulingva hajkaro, 2010. Tiu libro gajnis la premion “Libro de la jaro” de la legantoj de revuo “Literatura foiro”, organo de Esperanto – PEN klubo.

-- “Araneaĵoj” – dulingva hajkaro, 2016.

-- “Sortoj je vojkruciĝo”- bulgarlingvaj rakontoj, 2018. – interesa kaj emocia libro pri la nuna vivo.

Nun ŝi preparas la eldonon de nova libro kun rakontoj.

El ŝiaj libroj fluas tenereco kaj boneco. Estas tristeco, sed kaj amo al la homoj kaj al ĉiu vivaĵo. Estas ankaŭ kredo kaj espero.

Ivaniĉka Maĝarova ĉi jare estas jubileulino. Mi volas skribi por ŝi la plej bonajn vortojn, ĉar ŝi ilin meritas pro sia talento kaj amo en la koro. Mi prezentas kelke da el ŝiaj hajkoj kaj deziras al ŝi sanon kaj prosperon.



verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

En la kameno
paliĝas la ardaĵo.
Paŝoj de cervin’.

Amantaj treloj –
en branĉoj brava paser’.
Falinta nesto.

Tablo rompita.
Nefinlegita libro.
Anim’ vundita.

Ĝemas la ŝalmo
ĉe la frua tagiĝo.
Velkas folioj.

Vojeto blanka,
frostotremas nudmerloj.
Kameno...kaj Ŝi.

La manoj petas
bluson. Piano tristas.
Botel’ da Sherry’

Tablo, du tasoj,
krucigitaj rigardoj.
L’ kafo amaras.

Flugil’ de birdo
en sorĉita sunsubir’.
Falinta nesto.

Mia fenestro
nokte vian rigardas.
L’amo doloras.

En la ĝardeno
la safranoj ekflavas.
Ekpaŝas printemp’

verkis kaj sendis **Elena Popova**
el Bulgario

Mikrorakontoj de Dr. Paulo Sérgio Viana


SULTANO

La maljuna kato estis grave malsana. La posedantino, plurfoje en ĉiu tago, lamentadis: “Kio estos al mi sen mia Sultano?...” Antaŭ la forpaso, la edzo petis divorcon.



SENPAŬZE

La du katoj foje interbatalis; sed okaze de malsato, ili manĝis el la sama telero. Koncerne iliajn posedantojn - la edzo en la manĝoĉambro, la edzino en la vizitĉambro.



Fonto:
<http://tiny.cc/xhsa6y>

verkis
Dr. Paulo Sérgio Viana
el Brazilo

Tridek jarojn antaŭe, buseto kun profesoroj de la universitato de Ankara vojaĝis al Albanio, invitita por turisma vizito. La grupo traveturis la landon de sudo al nordo kaj foriris patrien kun bonaj impresoj. Inter ili okulfrapis mezaĝa, 42 jara, profesoro nomata Ilber Ortajlo, kiu prelegis en la Akademio de Sciencoj pri Ŝemŝedin Sami Frasheri, albana renesanculo de XIX jc. Albana ŝtata radiotelevizio publikigis lian prelegon.

Antaŭ nelonge, Ortajlo revizitis nian landon, ĉifoje kiel akademiano, bakita historiisto, ĵurnalisto kaj verkisto, vaste konata ne nur en Turkio sed ankaŭ en Eŭropo kaj mondo. Nun lia nomo enviciĝas preter aliaj famekonataj turkaj historiistoj, kiel profesoroj Halil Inancik, Ŝerif Mardin, Kemal Karpat, Niazi Berkeŝ, ka.



Ilber Ortajlo (kun la blua jaketo) en Bulgario

Je 13-an de julio 2005 mi mem revenis patrien post 12 jaroj da elmigrado en Turkio. Du tagojn antaŭe, matene, mi aĉetis 15 volumojn de

"Islam Ansiklopedisi", eldono de Ministrejo pri Edukado de Turkio, en la librovendejo de Ĝahaloglu de Istanbul. La morgaŭon mi iris al librejo en la kvartalo Bejoglu por fotokopii sciencan artikolon de prof Ilber Ortajlo je titolo "La marhaveno de Preveza en la Osmana Imperio", elĉerpita el unu libro lia, ĵus aperinta. Preveza estas nuntempe urbo en Grekio, sed siatempe estis kompakte loĝata de etnaj albanoj. Fakte oni ne permesis min fari tion tie, sed sugestis al mi lui ekzempleron ĉe la Germana Instituto pri Mezoriento, troviĝanta same en Bejoglu, kiu estis jam aĉetinta tiun libron. Tie oni helpis min malavare fotokopii la artikolon envorte. La artikolo helpis min poste en miaj studoj pri Ĉamerio, vasta albanloĝata regiono en Grekio.

Do, profesoro Ortajlo sin okupis iel ankaŭ pri Albanio kaj albanaj aferoj. Jen pliaj du ekzemploj:

Li skribas pri nia renesanculo kaj erudito, vaste konata en la Osmana Imperio, Ŝemŝedin Sami Frasheri. En iu intervjuo li substrekas ke Sami Frasheri estas simbolo en Albanio, interalie pro alfabeto kun latinaj literoj kompilita de li mem, same

pro gramatiko de la albana, eldonita en la jaro 1900 kaj pro dramverko je albana temo "Besa" kiu estas ludita en la albana teatro.



Pri Ŝemŝedin Sami Frasheri profesoro Ortajlo diras ke li estis distingita figuro ankaŭ por la Periodo de Tanzimato 1 en tuta Osmana Imperio. En la libro "La plej longa jarcento de (Osmana) Imperio", aperinta kvarfoje (1983, 1987, 1995, 2008), li envicigas albanan sciulon preter Ahmet Vefik Paŝao (verkisto, tradukisto kaj adaptisto de Moliero en la turkan lingvon, lingvisto kaj eksa osmana ĉefministro) kiel okcidenteme orientitaj personeculoj. Deveninte de "fama albana dinastio de Frasheroj en Albanio" Ortajlo diras pri Sami ke li verkis la unuan romanon en la turka lingvo "La amo de Talato kun Fitnet", enfilmita en Turkio dum jaroj 50-60 de XX jc.

Profesoro Ilber esprimiĝas: "La vortaroj "Kamus - u Turki" (La vortaro de la turka), "Kamus-u Fransevi" (Vortaro franca- turka) estas inter la plej bonaj de la turka lingvo, ankoraŭ uzataj; "Kamus'u'l Alam" (Monda vortaro), - estas enciklopedio ankoraŭ aktuala. Temas pri verkoj de homo neniam laciĝinta dum sia laboro".

Li daŭrigas: "Alia esploranta intelektulo kun okcidentema edukiĝo de moderna epoko estas Sami Frasheri". " Ŝemŝedin Sami estis influita de okcidenta liberala pensado, li skribis pri egaleco kaj libereco de virinoj" (temas pri la verko "Kadinlar").

Albanoj ĉeestas en ĉiuj verkoj de Ortajlo, danke al granda simpatio lia por ili.

Unuafoje, li kontaktis albanon el Kosovo, nome el urbo Prizreno, dum vojaĝo tra Balkanio. Jen kion li diras en intervjuo en la jaro 1990 en Albanio, publikigita en libro "Nilgyn Ujsal": "Mi ege aprezas albanan popolon. Albanoj estas fieraj, malavaraj sed malriĉaj. Albanio el la jaro 1990 rememorigas min Turkion el jaroj 40 kaj 50. Sed albanoj estas saĝaj. Ili donacis multajn elstarajn personojn. Vidu, eĉ tiu montarano izolita eklernis la italan aŭ aliajn lingvojn danke al radio (Ortajlo mem konstatis tion babilante kun lokanoj). Laŭ li, tio signifas multon pri la kapableco de ĉi tiu popolo.

Historie, en sia komuna kunvojado dum jarcentoj kun turkoj albanoj montris ekzemplojn de sia vitaleco kaj saĝeco. La amikeco inter ambaŭ popoloj daŭras ankoraŭ nuntempe. Same la interŝtataj rilatoj, inkluzive tiuj de universitatoj. Ambasadoroj de ambaŭ landoj neniam forlasis sian deĵoradon antaŭtempe, ĉar iliaj popoloj konas bone unu la alian. En mem Turkio

loĝas tre multe da albandevenaj civitanoj, inter ili ankaŭ altrangaj oficistoj kaj aferistoj.

Albanoj, laŭ Ortajlo sekvas religie kelkajn ekleziojn aŭ sektojn, sed ĉiuj ili estas konsciigintaj pri sia albaneco, aprezas nacian unuecon, super la diversaj religioj (islamo, katolikismo, ortodoksismo).

Ortajlo mencias beктаŝismon 2 kiel religia sekto liberala.


Li priskribas albanajn urbojn de Korĉa, Elbasan, Tirana, Lezha, Durres, Berat kaj Gjirokaster. Plie li bone parolas pri teatro, baletoj, arto albana ĝenerale kaj muzeoj.

Ni esperu ke li verku apartan monografion pri "albanoj en la Osmana Imperio".

Konstitucia Epoko en la jaro 1876.

2 Bektaŝismo: sekto de islama religio en Anatolio (nuntempa Turkujo) kiu estas sama al tiu de Alevismo (la anatolia Ŝijaismo) sed pli libera kaj ĉefe humanisma. Kiam Bektaŝismo estis malpermesita en la jaro 1926 Bektaŝismo trovis rifuĝejon en Albanio.

verkis **Laurant Bica** el Albanujo
Doktoro de Filozofiaj Sciencoj
Tirano 19. 2. 2019




1 Tanzimato: signifas novan reĝimon. Ĝi estas epoko de la Otomana Imperio ekde la jaro 1839 ĝis la Unua

Tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanujo

**Malkovri poetojn nekonatajn :
Edasseri Govinda Nair (1906-1974)**

**tradukis kaj sendis
Roland Platteau, el Francio**

Unu el la virtoj de Esperanto estas, ke ĝi ebligas malkovri aŭtorojn el landoj kies literaturo ne estas tradukita en onia lingvo, kaj kiuj ĉe vi tute ne estas konataj, dum ili estas klasikuloj kaj famuloj en siaj landoj. Tiel mi komencis sperti la mirindecon de Esperanto ekde la komenco kiam ĝi malkovrigis al mi hungarajn kaj svedajn poetojn, tute ne legataj en Francio.



Nu tiel mi volas ĉi jene iomete malkovrigi al vi la eble plej renomajn poetojn de la malajama lingvo. La malajama estas la lingvo de la hindia federacia subŝtato Kerala. Kerala ĉe la ekstrem-sudo de Hindio estas plurilate tute escepta lando. Ekzemple interalie, ĝi estas tiu kie troviĝas plej da komunistoj (kiuj regas la subŝtaton de duon-jarcento), kaj tiu kie la vivnivelo de la popolo kaj la vivdaŭra espero estas plej altaj.

La aŭtoro Edasseri Govindan Nair (1906-1974) estas eble la plej fama poeto de sia lando, kaj tiu poemo esble la plej ofe citata de li. Sed li estas tute nelegata en Francio, kaj mi trovis nur tradukojn en la angla, do jen la retraduko en Esperanton.

tradukis kaj sendis
Roland Platteau
el Francio



Kiel Diserva Floro (eltiraĵoj)

.....

Sed jen ja junvivo sur genuoj miaj
Venis kontentpleni korojn esperplenaj.
Lumo por l'okulo, malvarmeta vento
Almikaresanta, sangoĝojiganta.

Ordonis Vi de l'valo lin levi
Al vasta la supero lin gvidi.
Nu ĉu ligis Vi nin per ĉi ĉener'
Kor-nin-liga nur ke estu sufer'?

Vidi lin 'stis kiel matenruĝa ravo,
Kaj brakumbrio la santalodoro.
Festoplaco vasta al mi is la mondo
Kiomŝance mi 'stis en feliĉolando !

Mang-ekfloroj ! Ve mi l'nevidinto
Nigrajn nubojn de l'nepra estonto.
Meĉon mildan mi flamigis front'al
Ŝtormo kreskiĝanta, stulte, kial?
Mian Paradizon sur sablo mi fondis
Malesperinferon, per manoj, pretigis !

.....

Ho Kruele !

Nur vi

Diras eternan veron !
Dankeme ĵetas al Vi mi
Nomon: „Ho kompatema Vi!“
Kiel la diservan floron.
Piedoj Viaj akceptu !

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsėdžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilniusa universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**
el *Litovio*

-- oOo --

En ia vilaĝo vivis du fratoj. Unu estis riĉa, kaj la alia apenaŭ povis sian mizeran ekzistadon elteni. Por la riĉulo naskiĝis filo kaj li aranĝis luksan baptofeston. Tute nevolonte li invitis al la festo ankaŭ sian malriĉan fraton. Li ne estis ema iri, ĉar li ne povis aĉeti donacojn. Finfine li skrapis la lastan hordean farunon, bakis malgrandan kuketon kaj portis al la frato. Tiu, ekvidinte tian mizeran donacon, koleriĝis kaj malĝentile diris:

- Tiaj donacoj taŭgas nur por infero...

Rekaptis la mizerulo la kuketon kaj foriris al la infero. Iras, li iras kaj ekvidas li vastajn herbejojn, en kiuj ia homo barilon konstruas. La mizerulo demandas:

- Ĉu tio estas infero?

Tiu mansvingis malproksimen.

- Iru plu kaj vi trovos du homojn fajron bruligantajn.

Demandu ilin.

La mizerulo vojaĝas antaŭen. Jen vidas li, ke du homoj fajron bruligas kaj kuiras ion en la kaldrono. Li alproksimiĝas kaj petas:

- Lasu min en la inferon.

Unu el ili (tiu estis diablo) diras:

- Estas demandenda, ĉu vi pravas eniri.

Li ĉirkaŭturnis kaj kuregis en la inferon.

La dua (tiu estis anĝelo) diras al la mizerulo:

- Prenu ĉi-tiun sakon kaj tenu ĝin malkovritan.

Kiam la mizerulo faris, kiel ordonita, la anĝelo ekverŝis en ĝin la ŝaŭmon de sur la surfaco de la kaldronenhavo.

Baldaŭ revenis la diablo kaj diras:

- Vi ne pravas eniri la inferon. Revenu hejmen kaj loĝu tie ĝis sia morto.

Li do ekiris hejmen. Iras, li iras kaj subite li eksentis ege dormema. Li metis sian kapon sur terbulo kaj ekdormis. Vekiĝinte li vidas, ke la sako estas malplena, la ŝaŭmo forestas, nur ĉirkaŭ li aro da ŝafoj paŝtiĝas. Li stariĝis, ekiris kaj la ŝafoj sekvas lin. Post

ioma vojaĝado li renkontis tre belan sinjorinon (tio estis la Sankta Dipatrino), kiu diras al li:

- Homo, donu la ŝafojn al mi.

- Ne, mi ne povas, - respondis la mizerulo.

Tamen ŝi ne ĉesis la petadon kaj li fordonis ĉiujn ŝafojn.

Tiam la sinjorino donis al li du groŝojn kaj diras:

- Veninte hejmen metu unu groŝon en unu

malplenan grenujon, kaj la alian – en la duan. Matene rigardu, kio estos okazinta.

La mizerulo plenumis la ordonon.. Matene li vidas, ke ambaŭ grenujoj estas plenplenaj da mono. Ne kapablas la mizerulo kalkuli ĉion, eble li povus nur volumenmezuri. Sendas li kampserviston al la riĉa frato por pruntepreni la volumenmezurilon.

- Kaj kion vi mezuros, ke vi nenion havas?- rikanis la riĉulo kaj ne donis la mezurilon.

Iras por peti la mizerulo mem.

- Frato, pruntedonu mezurilon.

Tre nevolonte la riĉulo pruntedonis la mezurilon. Kiam la tuta mono estis disdividita, la mizerulo ŝovis unu ormoneron sub la mezurilingo kaj redonis la mezurilon al sia frato. Ekvidinte la ormoneron li ekmiregis kaj senprokraste kuris al sia frato.

- Kie vi ricevis tiom da mono? – demandadas li kaj liaj okuloj brilegas pro avideco.

- Kiam vi sendis min al la infero kun hordea kuko, mi iris tien kaj vendis mian kukon. Se vi irus tien kun multe pli bona kuko, vi ricevus multe pli da mono.

Kuris la riĉulo hejmen kaj diras al sia edzino:

- Karulino, baku laŭeble baldaŭ kukojn el la plej blanka faruno. Ni ambaŭ veturos al la infero. Mia frato pro simpla hordea kuko ricevis amasegojn da mono kaj ni ricevos multe pli.

Do, elveturis ili ambaŭ. Kaj post ilia elveturo neniu aŭdis pri ili ĝis nuna tago.

(FINO)

Ta loĝkvartalo estis ĉe la rando de la urbo. Ĝi aperis preskaŭ nerimarkeble antaŭ du jaroj. Oni nomis ĝin "Revo", tamen la vorto "kvartalo" ne estis tre preciza, ĉar ĝi konsistis nur je kvin altaj loĝdomoj. Proksime al la domoj estis parko, same nova, kun bedoj, floroj, arbetoj, maldikaj kiel infanaj brakoj, etenditaj al la ĉielo. En la mezo de la parko estis infanludejo kun glitiloj kaj luliloj.

En la novaj domoj loĝis junaj familioj kaj nun, en la komenco de la somero, en la parko estis multe da patrinoj kaj infanoj. La infanoj lulis sin, glitiĝis, kuris inter la benkoj. La patrinoj sidis kaj atentis, ke ili ne falu kaj ne rompu brakon aŭ kruron, aŭ ne kverelu unu kun alia.

Subite en la mezo de la infanludejo aperis stranga viro. Li estis mezaĝa, iom neglekte vestita kun griza pantalono kaj flava ĉemizo. Liaj longaj haroj libere falis sur liajn ŝultrojn. Se oni rigardis lin dorse, certe opinius, ke estas virino, ĉar li tre maldikis.

La viro staris senmova sur la infanludejo, strabante la ĉielon kvazaŭ serĉis ion tre gravan tie. La patrinoj alrigardis lin mire, sed post sekundoj ŝajnis, ke ne rimarkas lin. La viro staris kaj ne moviĝis. Kaj kiam la patrinoj jam opiniis, ke la strangulo restos tie senmova kaj silenta, li komencis terure krii:

–Bomboj! Bomboj! Milito! Milito!

Estiĝis tumulto. La patrinoj eksaltis de la benkoj, ĉirkaŭbrakis la infanojn kaj timigitaj forkuris malproksimen de la infanludejo, kie restis nur la strangulo kriante:

–Bomboj! Bomboj! Milito! Milito!

Unu el la patrinoj kun sia eta ido alkuris al malproksima benko, sur kiu sidis maljuna viro.

–Ĉu vi timiĝis? – demandis li ŝin.

–Jes – respondis la patrino. – Mi ne scias kial ĉiuj frenezuloj promenas libere en la urbo kaj ne estas en la malsanulejoj. Nenie oni povas esti trankvila. Ja, ĉi tie ludas infanoj. Li timigis ilin kaj nokte ili sonĝos koŝmarojn.

–Li ne estas danĝera – trankviligis ŝin la maljuno.
– Mi konas lin. Li nomiĝas Andreo. Antaŭe li estis bona, saĝa viro, inĝeniero. Verŝajne de antaŭnelonge vi loĝas ĉi tie?

–Jes, jam de du monatoj.

–Tial vi ne scias, ke antaŭ tri jaroj ĝuste ĉi tie estis fabriko pri infanteriaj minoj – klarigis la maljuno. – En tiu ĉi fabriko laboris Andreo. Tamen okazis eksplodo. Multaj laboristoj pereis. Neniu scias kia estis la kialo. Verŝajne iu laboristo eraris ion aŭ malatente agis. Andreo ne pereis, sed freneziĝis. Tiu ĉi loko memorigas lin pri la eksplodo kaj tial li ofte venas ĉi

tien kaj kriegas.

La frenezulo denove komencis krii:

–Bomboj! Bomboj! Milito! Milito!

Tamen, kiam li vidis, ke estas sola sur la infanludejo, trankviliĝis kaj iom mallaŭte li ekkantis:

–Paco! Estiĝis paco! Silento kaj trankvilo! Mi alportis la pacon sur la tuta tero.

–Jes – diris la maljuno. – Andreo pravus. Nun estas paco.

Poste la viro alrigardis la patrinojn kun knabineto kaj aldonis:

–Oni ne devas timi la frenezulon, sed la veran militon. Via filineto vivu en paco. La milito estu nur en la imago de la frenezulo.

verkis **Julian Modest**

Fonto: **Penseo #323** sept/2018

Vivsezonoj de Maria Nazaré Laroca

De longe ne plu someras...
Do mi prisemos printempon
en ĉidezertan aŭtunon,
ĉar jen vintro, kiu venas
en tristan dormon de l' ostoj,
en silenton de l' oreloj,
en ardecon de l' okuloj.

Tamen por tio necesas,
malfermi la animon,
kaj eklumigi l' Esperon,
kiam venos la rideto
el lum' de ĉiu mateno.

verkis **Maria Nazaré Laroca** el Brazilo

Fonto: <http://nazarelaroca.blogspot.com/2019/05/estacoes-da-vida-vivsezonoj.html>



HISTORIOJ PRI SINJORO KOJNO

(parto 2)

*rakonto de Berto Breĥto **

La arto ne korupti

Sinjoro K. rekomendis homon ĉe komercisto pro lia nekoruptebla. Post du semajnoj la komercisto revenis ĉe sinjoro K. kaj demandis lin: Kion vi volis diri pri nekoruptebla? Sinjoro K. diris: Se mi diras, ke la homo, kiun vi dungas, estas nekoruptebla, mi volas diri per tio: vi ne povas korupti lin.

Ĉu? diris la komercisto ĉagrene, nu, mi havas kaŭzon por timi, ke via homo korupteblas eĉ de miaj malamikoj. Tion mi ne scias, diris sinjoro K. neinterese. Sed al mi, ekkriis la komercisto, li ĉiam parolas laŭ miaj deziroj, do li korupteblas ankaŭ de mi! Sinjoro K. ridetis memplaĉe. De mi li ne lasas sin korupti, diris li.

Amo al patrolando, malamo kontraŭ patrolandoj

Sinjoro K. ne opiniis necese, vivi en iu certa lando. Li diris: Mi povas malsati ĉie. Sed iun tagon li iris tra urbo, kiu estis okupe tenata de la malamiko de la lando, en kiu li vivis. Tiam venis al li renkonte oficiro de tiu malamiko kaj lin devigis deĝi de la trotuaro. Sinjoro K. deĝis kaj perceptis en si indignon kontraŭ tiu homo, kaj pli precize ne nur kontraŭ tiu homo, sed precipe kontraŭ la lando, al kiu apartenis la homo, tiumaniere ke li deziris, ke ĝi forglutiĝu el la tergrundo. Per kio, demandis sinjoro K., por tiu minuto mi fariĝis naciisto? Per tio, ke mi renkontis naciiston. Sed pro tio oni devas ja ekstermi la stultecon, ĉar ĝi stultigas tiujn, kiuj renkontas ĝin.

Ankaŭ malbono ne estas malkara

Meditante pri la homoj, sinjoro Kojno ekhavis siajn ideojn pri la dispartiĝo de la malriĉeco. Iun tagon li deziris, ĉirkaŭrigardante en sia loĝejo, alian meblaron: pli malbonan, pli malkaran, malriĉecan. Tuj li iris al lignaĵisto kaj komisiis lin deskrapa la lakon de liaj mebloj. Sed kiam la lako estis deskrapita, la mebloj ne aspektis malriĉecaj, sed nur fuŝitaj. Tamen la lignaĵista fakturo estis pagenda, kaj sinjoro K. devis ankaŭ forĵeti siajn proprajn meblojn kaj aĉeti novajn, malriĉecajn, malkarajn, malbonajn, ĉar li deziris ilin ja tiaj. Luj, eksciinte pri tio, ridis nun pri sinjoro Kojno, ĉar ties malriĉecaj mebloj nun estis fariĝintaj pli multekostaj ol la lakitaj. Sed sinjoro Kojno diris: Al la malriĉeco konvenas ne ŝpari, sed elspezi. Mi konas vin: al viaj pensoj ne konvenas via malriĉeco. Sed al

miaj pensoj ne konvenas la riĉeco.

Malsati

Okaze de demando pri la patrujo, sinjoro K. donis la respondon: Mi povas malsati ĉie. Iom pli preciza aŭskultanto nun demandis al li, pro kio li diris, ke li malsatas, dum li ja reale havas por manĝi. Sinjoro K. pravigis sin dirante: Verŝajne mi volis diri: Mi povas vivi ĉie, se mi volas vivi kie regas malsato. Mi konfesas, ke estas granda diferenco, ĉu mi malsatas mem aŭ ĉu mi vivas kie regas malsato. Sed je mia senkulpigo mi eble rajtas aldoni, ke por mi, vivi kie regas malsato, estas se ne same malbone kiel malsati, tamen almenaŭ tre malbone. Por aliuloj ja ne gravus, se mi malsatus, sed gravas, ke mi estas kontraŭ tio, ke regas malsato.



Propono, se la propono ne estas atentata

Sinjoro K. rekomendis aldoni laŭeble al ĉiu propono ankoraŭ alian, por la kazo, ke la propono ne estos atentata. Ekzemple kiam li estis konsilinta al iu, kiu troviĝis en malbona situacio, certan procedon, kiu malutilus al plej eble malmulte da aliaj homoj, li priskribis ankoraŭ alian procedon, malpli sendanĝeran, sed ankoraŭ ne la plej senrespektan. Kiu ne povas ĉion, li diris, al tiu oni ne ŝparu ion malplian.

Originaleco

Nuntempe, plendis sinjoro K., ekzistas sennombraj homoj, kiuj gloras sin publike, esti kapablaj verki tute solaj grandajn librojn, kaj tio estas ĝenerale aprobata. La ĉina filozofo Ĝango Dzio verkis, jam plenkreska viro, libron de centmil vortoj konsistantan je naŭ dekonoj el citaĵoj. Tiaj libroj ĉe ni ne plu verkeblas, ĉar mankas la spirito. Sekve de tio, pensoj estas produktataj nur en propra laborejo, dum tiu konsideras sin pigra, kiu ne produktas sufiĉe da ili. Do ankaŭ ne ekzistas penso transprenebla kaj ankaŭ ne citebla formulado de penso. Kiom malmulte ĉiuj ĉi bezonas por sia laboro! Plumingo kaj iom da papero estas ĉio, kion ili povas prezenti! Kaj sen ajna helpo, nur per tiu mizera materialo, kiun unuopulo povas alporti surbrake, ili starigas siajn kabanojn! Pli grandajn konstruaĵojn ili ne konas ol tiajn konstrueblajn de unu sola homo.

La demando, ĉu ekzistas dio

Iu demandis sinjoron K., ĉu ekzistas dio. Sinjoro K. diris: Mi konsilas al vi pripensi, ĉu via konduto laŭ la respondo al tiu demando ŝanĝiĝus. Se ĝi ne ŝanĝiĝus, tiam ni forgesu la demandon. Se ĝi ŝanĝiĝus, tiam mi povas helpi al vi almenaŭ tiom, ke mi diras al vi: vi jam decidiĝis: Vi bezonas iun dion.

La rajto je malforto

Sinjoro K. helpis al iu ĉe malfacila afero. En la sekvo tiu esprimis nenian dankon.

Sinjoro K. nun mirigis siajn amikojn laŭte plendante pri la nedankemo de tiu homo. Ili trovis la konduton de sinjoro K. malnobla kaj diris ankaŭ: Ĉu vi ne sciis, ke oni faru nenion pro dankemo, ĉar la homo estas tro malforta por esti dankema? Kaj mi, demandis sinjoro K., ĉu mi ne estas homo? Kial mi ne estu tiom malforta por postuli dankemon? La homoj opinias ĉiam, ke ili konfesas sin stultuloj konfesante esti viktimo de fiago. Sed kial do?

La senhelpa knabo

Sinjoro K. parolis pri la malbona kutimo, spertitan maljustaĵon mute gluti, kaj rakontis jenan historion: Knabon poretantan preterpasanto demandis pri la kaŭzo de lia ĉagreno. Mi havis du groŝojn por la kino, diris la knabo, tiam venis knabo kaj elŝiris unu el mia mano, kaj li fingre montris knabon videblan iom distance. Ĉu vi do ne kriis por helpo? demandis la viro. Jes ja, diris la knabo kaj singultis iom pli forte. Ĉu vere neniu aŭdis vin? plu demandis la viro, lin ame karesante. Ne, diris la knabo kaj alrigardis lin kun nova espero, ĉar la viro ridetis. Tiam donu ankaŭ tiun, li diris, prenis la lastan groŝon el la mano kaj senzorge pluiris.

Sinjoro K. kaj la naturo

Demandite pri sia rilato al la naturo, sinjoro K. diris: Mi ŝatus, paŝante el la domo, vidi kelkajn arbojn. Precipe ĉar, per sia diversa aspekto laŭ la tagaj horoj kaj la sezonoj, ili atingas apartan gradon da realeco. En la urboj ni krome konfuziĝas post iom da tempo vidante nur utilaĵojn, domojn kaj trajnojn, kiuj neeloĝate estus malplenaj, neuzate sensencaj. Nia stranga, posedeca sociordo igas nin konsideri eĉ la homojn utilaĵoj, kaj laŭ tio la arboj havas - almenaŭ por mi, kiu ne estas lignaĵisto - ion trankvilige memstaran, al mi ne celantan, kaj mi krome esperas, ke ili havas eĉ por lignaĵisto ion neutiligeblan.

Kial vi ne veturas kelkfoje, kiam vi volas vidi arbojn, simple en la liberan naturon? oni demandis lin. Sinjoro Kojno respondis mirigite: Mi diris, ke mi ŝatus vidi ilin,

paŝante el la domo.

(Sinjoro K. diris ankaŭ: Estas ankaŭ necese por ni, fari ŝpareman uzon de la naturo. Sen laboro restante en la naturo, oni facile transiĝas en malsanan staton, oni estas atakata de io febrosimila.

Konvinkaj demandoj

Mi rimarkis, diris sinjoro K., ke ni fortimigas multajn homojn de nia doktrino per tio, ke ni scias respondon al ĉio. Ĉu ni ne povus - por la intereso de la propagando - listigi demandojn, kiuj ŝajnas al ni tute nesolveblaj?

Fidindeco

Sinjoro K. kiu estis por la ordo de la homaj rilatoj, estis tempe de sia vivo envolvita en luktoj. Lun tagon li ree falis en malagraban aferon, kiu necesigis, ke li atingu dumnokte plurajn renkontajn punktojn en la urbo, kiuj malproksimis unu de la alia. Ĉar li estis malsana, li petis amikon pri mantelo. Tiu promesis ĝin al li, kvankam li devis pro tio rezigni pri rendevuo. Sed iom antaŭ la vespero la kondiĉoj de sinjoro K. malboniĝis tiom, ke tiuj iradoj ne plu havis sencon kaj tute aliaj decidoj fariĝis necesaj. Tamen kaj spite al la tempomanko sinjoro K., zorga pri siavice plenumi la interkonsenton, iris akurate preni la senutiliĝintan mantelon.

La revido

Viro, kiun sinjoro K. longe ne estis vidinta, salutis lin kun la vortoj: Vi tute ne ŝanĝiĝis. Ho! diris sinjoro K. kaj paliĝis.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo
*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/kojno.html>

* Bertolt Breĥto (Eugen Berthold Friedrich Brecht; (1898 Augsburg - 1956 Berlino) estis germana verkisto, dramisto kaj reĝisoro, li havis komunismajn idealojn.



Ŝercoj



Viro ploregas ĉe la tombo de sia edzino.
Ĝuste tie iras la pastro kaj li konsolas lin:
— Filo mia, ne ploru! Vi renkontiĝos en la ĉielo.

— Sinjoro paroĥestro, pro tio mi ploras.

— Ĉu vi vidas tiujn du virinojn?

— Jes, mi vidas ilin.

— Mi malkaŝas al vi, ke la dekstra estas mia edzino kaj la maldekstra estas mia amatino.

— Interese, ĉe mi estas inverse.

La patro kaj lia fileto promenas en la bestoĝardeno. Ili haltas antaŭ la kaĝo de la leono, kaj la patro demandas:

— Fileto mia, kiu besto ĝi estas? Ĉu vi scias?

— Jeŝ. Ĝi estas leporjo.

— Ne. Ĝi estas leono.

Ili iras plu kaj ili haltas ĉe ĝirafo.

— Kiu besto ĝi estas? — demandas denove la patro.

— Leporjo.

— Kara mia, ĝi ne estas leporo. Ĝi estas ĝirafo. Ĉu vi ne vidas ĝian longan kolon?

Ili iras plu kaj ili alvenas al la hipopotamo. La patro scivole demandas, kiun beston ili vidas? La knabeto denove fiere diras:

— Leporjo.

La patro koleriĝas kaj li diras nerveze:

— Fileto mia, ĉu vi estas blinda? Tiu ĉi giganta besto vivas en akvo.

La knabeto trankvile respondas:

— Tiam ĝi estas akvoleporjo.



Silaba Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonaj silaboj:

AR, BA, BU, DER, DIS, DO, FE, KA, KO, LAN, LE, LO, MI, MO, NE, NI, NO, PE,

RA, RO, RO, ŜI, TA, TI, TO, TU.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

- Ĝia ĉefurbo estas Amsterdamo;
- Ĉefurbo de Italio;
- Genro de bovenoj;
- Kemia elemento kun la simbolo Fe;
- Eltenata, suferata;
- Movebla interligo de ostoj;
- Celi, klopodi;
- Sekretigi, prisilenti.

Fonto: Semajno de Enigmoj #3

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

- La imperiestro de la Granda Incendio de Romo;
- Servisto, kelnero;
- Haŭta tavolo sub la epidermo;
- Bosko, forsto;
- Aniĝilo, mendoformularo;
- Mia ___ amiko;
- Nomo de la fondinto de la Ordeno de la Predikantoj;
- Palpita.

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

1	2			3	4		5
6			7				
		8				9	
10					11		



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Peter Singer (1946-)


Moderna tabano

Pensu pri infano, kiu falis en lageto kaj baldaŭ droniĝos kaj ke vi havas gravan rendezuon kaj vi estas vestita laŭe. Ĉu vi forlasus la infanon por iri al via rendezuon aŭ ĉu vi plonĝus en la akvon por savi la infanon, do vi maltrafos vian rendezuon kaj malpurigos viajn vestojn? Vi certe plonĝus en la akvon por savi la infanon kaj ĉiu farus tion ĉar vivo kaj ĉefe vivo de infano estas pli valora ol io ajn alia. Tiu, kiu pensus alie estus ia monstro!

Sed kio pri la infanoj en Afriko kiuj malsatas aŭ ilin trafis malsano kaj ĉiutage kelkaj perdas sian vivon? Eble tiu malsano estus facile kuracebla per malmultekosta vakcino aŭ kontraŭ la malsaton oni povus facile kontraŭbatali per manĝohelpado kaj fosado de putoj. Ĉu vi donacus monon por savi la vivon de infanoj en Afriko? Eble donaco de malgranda sumo al help-organizaĵoj savus la vivon de iu infano.

Ja la vivo de la afrika infano estas same grava kiel la vivo de la infano en la lageto. Tamen homoj ne reagis al tio same, kiel ili reagis al la infano en la lageto. Tiuj, kiuj reagis same estas eksterordinaraj homoj. La aŭstralia filozofo Peter Singer asertas, ke la vivo de ambaŭ infanoj estas same gravaj. Ni mem forĵetas manĝaĵojn el nia fridujo sed multaj infanoj en Afriko eĉ ne trovas puran akvon por trinki.

Ni ja povas oferi kelkajn luksaĵojn por savi la infanojn en Afriko. Sed ĉi tiu filozofio de Singer estas malfacile aplikebla filozofio. Oni pensas, ke ja estos aliaj, kiuj donacos monon. Eble vi pensas, ke helpi al homoj en Afriko farus ilin dependemaj al la riĉaj landoj kaj tiel ili neniam klopodos fari ion por plibonigi siajn proprajn vivojn. Tamen ne reagi pro tia kialo faras la situacion eĉ pli malbona. Nuntempe estas tro da landoj, kiuj bezonas helpon. Per malgranda donaco ni povus fari tiujn landojn malpli dependemaj al niaj riĉaj landoj. La mesaĝo de Singer estas: "helpi al la vivo de aliaj estas grava afero".



Singer estas unu el la plej gravaj filozofoj, kiu ankoraŭ vivas. Li estas grava ĉar li defiis kelkajn jam disvatiĝintajn sed erarajn pensojn de la homaro. Li eĉ havas kelkajn nekutimajn pensojn pri kiuj la aliaj homoj diskutas multe. Ekzemple li pensas pozitive pri eŭtanazio kaj ankaŭ pri fini la vivon de homo, kiuj troviĝas en vegeta vivo kaj ne estas espero resaniĝi. Pri kio ni daŭrigu teni iliajn korpojn vivajn? Multaj kontraŭreagis al Singer kaj eĉ nomis lin "nazio" kvankam li estas judo kaj infano de juda familio kiu forfuĝis el Vieno dum la nazia tempo.

Singer fariĝis fama pere de siaj libroj pri la homa konduto kontraŭ la bestoj. Ĉefe pere de la libro "Besta Libereco" (1975). Antaŭe Jeremy Bentham (rigardu Turka Stelon #023) kaj Stuart Mill (rigardu Turka Stelon #026) ankaŭ pensis kaj verkis pri la rajtoj de bestoj kaj ilia suferado pro homaj agadoj. Bestoj suferas pro buĉado, bredado en ne taŭgaj kondicioj, kaj ankaŭ uzado kiel provbestoj en la sciencaj eksperimentoj. Singer nomis tiujn, kiuj ne respektas la rajtojn de bestoj, "specistoj". lasence tiuj, kiuj nur respektas la rajtojn de sia propra speco. Io same al "raciisto". Li pli poste parolis pri kaj apogis "vegetarismon" ĉar homoj povas vivi sen manĝi viandon kaj do ne necesas buĉi bestojn por manĝi ilin.

Same al Sokrato (rigardu Turka Stelon #002), kiu vivis multaj jarcentoj antaŭe, Singer ankaŭ faris publikajn eksplikojn kaj instruis pri kiel ni devas vivi. Multfoje homoj protestis pri liaj instruoj. Oni eĉ minacis lin kun mortigo. Tamen li prezentas la plej bonajn kutimojn de filozofio. Li defias la plej vastajn kredojn de homoj. Li ĉiam estas preta respondi al la defioj de la aliaj, kiuj kontraŭstaras liajn pensojn kaj li provas apogi siajn pensojn kun fortaj argumentoj. Eĉ se vi ne havas la samajn pensojn kun Singer, indas kaj endas legi liajn librojn por kompreniliajn pensojn ĉar ili helpas al vi pensi pri detale pri tiuj aferoj.

Oni dirus ke Singer estas la moderna enuiga tabano, kiu provas daŭre reformigi kaj plifortigi la pensojn de Sokrato, la animon de filozofio.

(FINO)

"Najbaro mia! Kara kamarad!
 Vi manĝu supon! Petas mi, bonvolu."
 "Mi estas tute sata de manĝad'."
 "Ho, ne! Ankoraŭ tason, ne parolu!
 La sup' bongustas, provu ĝin!"
 "Tri tasojn manĝis mi." — "Nu kial la kalkulo?
 Ankoraŭ manĝu vi, karulo,
 Por sanefiko ĝis la fin!
 Bonegas fiŝa sup'! Kaj estas ĝi kun gras':
 Ja kvazaŭ de sukcen' flavetas tiu tas'.
 Konsolu min, mi petas vin kun amo!
 Jen tripoj, jen sterled', jen bramo.
 Ekprovu vi ankoraŭ de la vaz'!»
 Regalis tiel Damien' najbaron
 Kaj laŭdis li sen ĉes' miraklon kulinaran.
 Kaj la najbar' plenŝvitas pro gastig',
 Sed tamen prenas li ankoraŭ unu tason,
 Kun lasta streĉa fort' la supon grasan
 Altrude glutas li. - "Jen estas vi amik'!"
 La mastro diras: "Tute sen fiero!
 Nu manĝu vi ankoraŭ por prospero!"
 Sed malgraŭ bongustaj' jam krevis la toler':
 La malfeliĉa gast' en plena malesper'

Kaptinte la bastonon,
 La ĉapon kaj la zonon,
 Al sia hejm' rapidis sen prokrast'
 Kaj plu al Damien' ne venis kiel gast'.
 Verkist', feliĉas vi pri via verk-talento,
 Sed estu en okaz' modesta kaj silenta,
 Ne tro abundu vi en deklamad' turmenta,
 Ĉar povas via verk' fariĝi abomen'
 Kaj tedos kiel sup' de majstro Damien'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
 Ukrainio



El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (33)

DUA PARTO - LA VIVO

58



**Kies registaro estas kvietaj kaj ne trudema,
 ties popolo estas sincera kaj honesta.
 Kies registaro estas sagaca kaj rigora,
 ties popolo estas malica kaj nefidinda.
 Estas la malfeliĉo sur kiu apogas sin la feliĉo.
 La feliĉo estas tio, kiun embuskas la
 malfeliĉo.**

**Sed kiu ekkonas, ke ĝi estas la plej alta,
 se oni ne ordonas ion?**

**Ĉar alikaze la ordo ŝanĝiĝas en kapricojn,
 kaj la bona ŝanĝiĝas en superstiĉon.**

**La tagoj de la blindeco de la popolo
 daŭras ja vere longe.**

Tial diras la saĝulo:

**Li estas modela persono sen pritranci ion,
 Li estas akurata, sen esti ofendema,
 li estas aŭtentika sen arbitri,
 li estas hela sen blindigi.**

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

„Estas la malfeliĉo sur kiu apogas sin la feliĉo.
 La feliĉo estas tio, kiun embuskas la malfeliĉo.“

Laŭ la originalo, ĉi tie ne temas pri tio, kio estas malfeliĉo kaj kio feliĉo, temas pri fakto, t.e., la feliĉo sin apogas sur malfeliĉo. Kaj la malfeliĉo sin kaŝas en feliĉo.

Vd. de Wang Chongfang:

„Ho malfeliĉo! La feliĉo sin apogas sur ĝi;
 Ho feliĉo! La malfeliĉo sin kaŝas en ĝi.“

Vilhelmo:

„Tial diras la saĝulo;“

Laŭ la originala devus esti:

„Sed kiu ekkonas, ke ĝi estas la plej alta, se oni ne ordonas ion?“

Laŭ mia opinio la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„Kiu do povus antaŭvidi la lastajn rezultojn?“

Vilhelmo:

„Li estas modela persono sen pritranci ion,
 Li estas akurata, sen esti ofendema,“

Pri tiuj ĉi frazoj, mia opinio la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„Tial, la Saĝulo estas kvazaŭ kvadrata sen anguloj
 Kaj havas kvazaŭ eĝojn, kiuj tranĉvundus neniu.“

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Poste tio pasis. Li aĉetis belajn vestojn. Li drinkis. En la fino de junio, li foriris al Deauville kun sia amorantino.

En Parizo, kiam malkreskis la varmego ĉirkaŭ la vespero, la Karinoj eliris, iris al la Bosko, al Pavilono Dauphine.

La gepatroj restis tie, malĝoje aŭskultante la bruojn de l' orkestro, memorante pri la Insuloj, pri la ĝardenoj de Moskvo. Dume, Lulu kaj aliaj gejunuloj paŝadis laŭ la mallumaj aleoj, deklamante versojn, ludante la amludon.

Lulu aĝis dudek jarojn. Ŝi estis malpli bela ol antaŭe, magra, kun abruptaj movoj kiel tiuj de knabo, kun la haŭto malhela, maldelikata kaj iom bruligita de la vento dum la longa marvojaĝo, kun stranga, laca kaj kruela mieno.

Ŝi iam ŝatis sian maltrankvilan vivon, danĝeran kaj ekscitan.

Nuntempe, pli ol ĉio tio plaĉis al ŝi tiuj promenadoj en la Pariza krepusko kaj la longaj senvortaj vesperoj en la trinkejoj, ĉe la homplenaj verŝotabloj kun iliaj odoroj de kreto kaj alkoholo, kaj la bruado de la bilardoj en la salono de l' fundo.

Ĉirkaŭ noktomezo, ili reiris al ties aŭ alies domo, kaj ili rekomencis drinki kaj karesi unu la alian en la mallumo.

La gepatroj dormis kaj svage aŭdis la gramofonon ludi ĝis la tagiĝo. Ili vidis nenion aŭ deziris nenion vidi.

Iun nokton, Tatjana Ivanovna eliris el sia ĉambro por repreni la tolaĵon, kiu sekiĝis en la tualetejo. Ŝi forgesis ĝin sur la banhejtilo la antaŭtagon, kaj necesis fliki paron da ŝtrumpoj por Lulu. Ŝi ofte laboris nokte. Ŝi bezonis malmultan dormon, kaj je la kvara aŭ kvina horo ŝi jam ellitiĝis, silente rondiris en la ĉambroj sed neniam eniris en la salonon.

Tiun nokton, ŝi estis aŭdinta paŝojn kaj voĉojn en la koridoro; jam de longe la infanoj verŝajne foriris.

Ŝi vidis lumon sub la pordo de la salono.

"Refoje ili forgesis malŝalti la lampon", ŝi pensis.

Ŝi malfermis la pordon kaj nur tiam aŭdiĝis la gramofono, ĉar ĝin ĉirkaŭis remparo de kusenoj.

La mallaŭta anhelanta muziko ŝajnis pasi tra tavolo da akvo.



La ĉambro estis duonluma. Unu nura lampo, vualita per ruĝa tuko, lumigis la divanon, kie Lulu kuŝis kaj ŝajnis dormi, kun sia robo malfermata sur la brusto; ŝi brakumis knabon kun lia pala delikata vizaĝo malantaŭen klinita.

La maljunulino alproksimiĝis. Ili vere dormis, kun siaj lipoj ankoraŭ kunmetitaj, kun la vizaĝoj unu ĉe la alia.

Odoris je alkoholo kaj densa fumo plenigis la ĉambron; glasoj, malplenaj boteloj, diskoj, plenplenaj cindruoj, kusenoj, kiuj daŭre konservis la korpajn formojn... ĉio kuŝis dise-mise sur la planko.

Lulu vekigis, fikse rigardis Tatjanan Ivanovnan, kaj ridetis. Ŝiaj dilatiĝintaj okuloj, nigriĝintaj pro la vino kaj la febro, esprimis mok-indiferentecon kaj lacegon.

Ŝi dolĉe murmuris:

"Kion vi volas?"

Ŝiaj longaj misaranĝitaj haroj pendis sur la tapiŝo. Ŝi ekmoviĝis por relevi la kapon. La mano de la junulo kuntiris la taŭzitaĵajn hartufojn. Ŝi abrupte deprenis ilin kaj sidiĝis.

"Kio okazas?" ŝi senpacience rediris.

Tatjana Ivanovna rigardis la knabon. Ŝi bone konis lin; ŝi ofte vidis lin en la domo de la Karinoj, dum lia infanaĝo. Li nomiĝis princo Georgo Andronikof; ŝi memoris pri liaj longaj blondaj bukloj, pri liaj kolumoj el punto.

"Ĵetu tiun eksteren!... ĉu vi aŭdis?" ŝi subite diris, kunpremante la dentojn, kun sia maljuna vizaĝo tremanta kaj palega.

Lulu levis la ŝultrojn.

"Nu, bone... silentu!... li tuj foriros..."

"Luliĉka...", murmuris la maljunulino;

"Ho, jes! ... Silentu! je Dio!..."

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

Atentu, ke Laocio jam sciis, ke ekzistas ne nur bonaj regantoj, sed ankaŭ malbonaj. Kiu kortega filozofo kuraĝus diri tion? Li scias, ke malicaj regantoj kreas malicajn subgatojn. Li ne simple flate asertas, ke la popolo ĉiam estas bona, kaj li scias eĉ, ke la plej alta ordo en vero estas tiu, kiu tute ne bezonas reganton, denove tre moderna penso de Laocio, en kiu la anarkiisma penso pri tio, ke oni

regu neniu kaj estu regata de neniu, fakte ĝerme jam estas formulita. Krome Laocio ne ŝatas minacajn montrofingrojn de instruistoj kaj arbitran regadon. Kion plu ni povus postuli de filozofo, kiu vivis jam tre longe antaŭ la pli maljuna Pieter Brueghel. Tiu pentris la faman bildon, en kiu blinduloj kondukas blindulojn en fosaĵon, do blinda registaro blindan popolon.

(daŭrigota)

Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

Baghy – la plej esperanta verkisto el ĉiuj

Unu el la plej fekundaj kaj multflankaj verkistoj en Esperanto dum la intermilitaj kaj postmilitaj jaroj estas la hungaro Julio Baghy. Li naskiĝis en 1891. Lia familio havis longan tradicion de la teatra profesio kaj kiel junulo li studadis en aktora lernejo. Li eklernis Esperanton en 1911 kaj baldaŭ poste partoprenis Esperantan aktivadon. Sed venis la milito kaj Baghy devis soldatiĝi. En septembro 1915 li estis kaptita kaj poste devis pasigi jarojn en diversaj rusaj militkaptitejoj. Tiuj spertoj donis gravan materialon al multaj liaj poemoj kaj al du el liaj romanoj.



En la fino de 1920 Baghy revenis al sia hejmlando. Li fariĝis kunfondanto de la grava literatura revuo Literatura Mondo kaj komencis vojaĝadon por gvidi kursojn, prelegi kaj helpi la Esperanto-movadon en multaj landoj. La periodo 1939-1954 estis malfacila, sed poste Baghy denove komencis okupi sin pri Esperanta laboro kaj verkado. Tion li faris fruktodone ĝis sia morto en 1967.

Baghy aŭtoris verkojn de ĉiuj ĝenroj: poezio, romanoj, noveloj, dramoj. Sian verkistan karieron li komencis per poemlibro *Preter la vivo* (1922). Pliajn kvar poemarojn li verkis: *Pilgrimo* (1926), *La vagabondo kantas* (1933), *Ĉielarko* (1966) kaj *Aŭtuna foliaro* (1970).

Lirikemo kaj elokvento karakterizas la poemojn de Julio Baghy. Li ne celis ellaboritan artan rafinitecon aŭ poezian lingvaĵon. Tial liaj poemoj estas ĝenerale facile legeblaj kaj tial taŭge enkondukas junajn legantojn en la Esperantan poezion. Baghy parolas al siaj legantoj pri vivrealaj temoj, ofte intime ligitaj al liaj propraj vivo-spertoj kaj memoroj, iafoje melankoliaj kiel la sekvanta, *Ĉe samovaro*, kiu estas unu el liaj plej konataj poemoj.

*Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas*

*la amikoj ekparolas:
“Havi landon en libero,
tamen migri tra la tero,
iri vojon, sed sencelan ...
Ĉu vi konas pli kruelan?”
La hungaro ne respondas,
liaj pensoj ĝeme ondas,
viŝas larmon retenitan:
“Havi landon, sed perditan ...”
Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume
ili ploras, ploras kune.*

(el *Pilgrimo*).

Baghy ofte uzas simplajn strofo-formojn kiel la ĉi-suprajn, sed ankaŭ malpli simplajn. Efektive la varieco estas nekredeble granda. Laŭ kalkulo (de Marjorie Boulton) oni povas distingi 174 diversajn strofo-formojn inter la 322 poemoj en la kvin poemlibroj de Baghy. Li ne emis enfermi siajn sentojn en formulojn antaŭe pretajn, la rilato inter enhavo kaj formo havas memsekvantan karakteron.

Julio Baghy verkis ankaŭ kelkajn romanojn. Liaj romanoj, *Viktimoj* (1925) kaj ĝia daŭrigo *Sur sanga tero* (1933) estas bazitaj sur liaj spertoj kiel militkaptito en Siberio. Ili havas tie siajn temajn radikojn kaj tiel havas dokumentan valoron. Ili priskriboj de la krueliĝo de homoj al homoj, kiam ili fariĝas viktimoj de malhomecaj kaj ideologiaj cirkonstancoj, havas tamen pli vastan signifon. Viktimoj estas ne nur la suferantoj, sed ankaŭ la suferigantoj. La temo de tiuj du libroj havas sekve universalan validon. La stilo de la du libroj estas grandparte dialoga, preskaŭ teatra. Tiu stilo estis tiam io nova en la Esperanta literaturo kaj havis tiom pli gravan valoron.

La plej granda romano, *Hura* (1930), ankaŭ temas pri suferoj, sed estas pli komplika verko, unuflanke satira, aliflanke romantika. Tiu mikso tamen havas realecan impreson, eble atendeblan, ĉar kritikemo kaj sentemo ofte kuniras en la vivo mem. Optimismo kaj pesimismo, emocioj kaj inteligento interluktas en la romano, kaj la verkisto klopodas trovi ekvilibron inter ĉiuj kontraŭaj fortoj. Vivaj dialogoj ecigas tiun

romanon same kiel la siberiajn romanojn, la dialogoj dramigas la stilon, kvankam ili ofte havas filozofian karakteron. Tiu granda romano, ampleksanta 466 paĝojn, estas sendube la plej interesa verko de Baghy.

Ankaŭ la noveloj kaj teatraĵoj de Baghy meritas atenton. Lia teatraĵa ĉefverko estas la versodramo *Sonĝe sub pomarbo* (1958). Tie la verkisto kunigas la genezan miton pri Adamo kaj Eva kaj sciencfikciajn elementojn.

Entute, aperis de Julio Baghy 18 libroj. La varieco de ĝenroj atestas lian verkistan multflankecon. Stile li

estas majstro de la dialogo. Siatempe li, la homo mem, estis kvazaŭ idolo de la ĝenerala esperantistaro. Lia samlandano, la Esperanto-verkisto Tárkony, eĉ nomis lin en verso "paĉjo de la' tuta mondo Esperanta". Tiu kulto estas forgesita, sed la plej bonaj verkoj de Julio Baghy daŭre vivas inter la plej gravaj kreaĵoj en la internacia lingvo.

de **Baldur Ragnarsson**

Artikolo verkita por la revuo *Juna Amiko* (#94, 2000)
Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/baghy.html>

Ĉu homaro vojaĝos inter la steloj?

Homaro troviĝas en la kosmo. Ĉiutage homoj loĝas en la kosmo kaj vojaĝas ĉirkaŭ Tero en la Internacia Kosmostacio. En 1969, homoj alteriĝis sur la surfacon de la Luno la unuan fojon.

Tiuj atingoj estas mirindaj sed ili ŝajne estas nenio kompare de la vasteco de la universo.

La Luno estas mezume 384.000 kilometrojn for. Tio

ja estas longa distanco sed la plej proksima stelo, Proksima Centaŭro estas pli ol 40.100.000.000 kilometrojn for, pli ol kvar lumjarojn. Kaj tio estas la plej proksima stelo.

La kosmosondilo Voyager 1 estas unu el la plej rapidaj aĵoj kiun homaro iam sendis. Ĝi vojaĝis pli longdistance ol io ajn. Tamen ĝi ne vojaĝos pli ol unu lumjaron ĝis 17.000 jaroj poste nun. Por atingi

7 >> mezuro. Kaj la fermitaj ejoj bone montras la etoson de la glasa sfero de arto enkondukita de Addison en la komenco. Estas preskaŭ neniuj subĉiela sceno en la filmo. De scenejo, al kuliso, al hejmo, al hotelĉambro...

Ĉu "kial mi elektis ĉi tiun filmon?"... Por rakonti pri la neantaŭvidebleco de homo. Fakte estas similaj okazaĵoj en nia reala vivo. Iuj aferoj evidente montras, ke ni eraras tamen ĉi tion ni ne komprenas. Ni enkaptiĝas. Ni trompiĝas. La kerno de tiu, kiu okazas estas kaŝita. Estas kelkaj signoj, tamen ni ne povas kompreni ilin! Sed estas aliaj, kiuj ne trompiĝas. La skeptikuloj. Ili ne kredas je ĉio, kion oni diras. Same al detektivoj, ili malkaŝas la okazaĵojn.

Laŭ iuj homoj, ĉiu maniero atingi la celon estas legitima. La aliaj ne povas kompreni tion, ĉar ili estas konsciaj aŭ oportunismaj, kaj ne kapablas esti Makiavelismaj. La teatro-medio estas unu el la lokoj, kie malkaŝiĝas homaj rilatoj. Similajn aferojn oni

verkis Jason Mey el Usono

Proksiman Centaŭron, ĝi devus vojaĝi dum ĉirkaŭ 70.000 jaroj.

Nunaj rimedoj por vojaĝi en la kosmo ne sufiĉas por homoj atingi aliajn stelojn. Ja ekzistas opcioj hipotezaj, kiel la uzado de atom- aŭ hidrogenbomboj por puŝi kosmoŝipon aŭ la uzado de lumvelo kun fortaj laseroj por atingi grandajn rapidojn sed tiuj restas nur hipotezaj.

Mi priskribis la Fermi-paradokson en blogafiŝo antaŭ tri monatoj kaj mi iam scivolas ĉu la neebleco de interstela vojaĝado estas bona solvo.

Certe io povus ŝanĝiĝi. La ideo de la homara atingo de la Luno ŝajnis freneza antaŭ nur 200 jaroj. Estonteca teknologio povus fari interstelan vojaĝadon ebla. Tamen, ĝis tiam, oni rajtas demandi ĉu homaro iam ajn vojaĝos inter la steloj.

verkis **Jason Mey** el Usono

Fonto: el la blogo *Pri Io Ajn* - Blogo de variaj temoj
<https://priioajn.wordpress.com/2019/04/13/cu-homaro-vojugos-inter-la-steloj/>

spertas en ĉiu sektoro, en ĉiu tempo.

Ĉu la filmoj povas rakonti avertemajn rakontojn kaj lasi la "malbonulojn" eniri en la vojon de kompatato kaj konscienco? Mi ne pensas tiel. Ni nur ĝuas spekti la filmojn. Ambicia kaj malbona spektantaro ne diras "Kiaj homoj estas en ĉi tiu vivo!" kaj ne ellernas de la okazaĵoj. Kontraŭe, mi pensas, ke ili identiĝas kun la malbonuloj en la filmoj.


Mi jam diris al vi, ke mi ne plu parolos pri la tria scenaro. Sed ŝajne mi malkaŝis ĝin iomete.

Estas repliko en la filmo: "Vi ĉiuj scias ĉion pri Eve. Kio restas, ke vi ankoraŭ ne scias?"

Kompreneble, ĉi tiu estas repliko, elparolata en la premio ceremonio, por tiuj, kiuj konas ŝin en la filmo.

Sed se vi volas koni homojn kiel Eve aŭ rememori similajn homojn, spektu la filmon!

verkis ka sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo



Ĉe la piedo de la Granda Piramido staras alta viro. Senmove fiksas sin la rigardo al la fora horizonto, kie malrapide subiras la sangoruĝa sunĝlobo. Kiel statuo li staras, kaj facila vento ludas kun liaj longaj grizetaj haroj. La lastaj sunradioj reflektiĝas sur la alta frunto. Ĉu vere -- la lastaj...? Nu, la meteorologoj jam antaŭ jaroj deklaris neeviteblan katastrofon de la teratmosfero. Antaŭ jarmiloj -- laŭ la Biblio -- pereis preskaŭ la tuta homaro je inundo; pro evidentaj kaŭzoj sekvas nun incendio, asertas la sciencistoj. Laŭ kalkuloj restas nur nemultaj horoj, kaj poste...? Poste eksplodos brulego, kiu supozeble neniigos la plej grandan parton de la Tero...



La homaro ne pereos: ĝi povas fidi al la grandioze evoluinta tekniko. La viro ridetas: subkonscie oni sentis danĝeron jam delonge. La plej grandaj talentoj dediĉis sin al esploroj teknikaj; kulturo, male, degeneris. Jes, ekregis kvazaŭ ia teknika frenezo, ĉiun alian valoron oni malatentis. Nun la homaro serĉas rifuĝon sur la plej proksimaj planedoj; nun unu homo rifuzas la savon: Ben Akir, filozofo. Oni provis lin persvadi, deteni de la decido resti sur la Tero. Sed fine devis iu pensi prefere pri si mem, pri la propra estonteco. Fine en la tumulto oni forgesis; nur li ne subiĝis al la paniko.

Ben Akir levas la brovojn: li ja estas efektive la lasta homo sur la Tero! Okazintaĵoj pasas antaŭ li: Precize je la 13a horo laŭ Griniĉo startis la lasta spacorakedo kun pasaĝeroj. Ben Akir sekvas ĝian rapidan fuĝon... poste ascendas sian elektran aeroplanon kaj forflugas orienten. Romo -- Ateno -- Aleksandrio: ruinoj de la malnova mondo ...; li celas Egipton. Ankoraŭ foje li volas rigardi la antikvajn monumentojn de la homa kulturo ... Kiom da aspiroj kaj esperoj! Nun ĉio forpasis. Ĉiuj rapidas konstrui la Novan Vivon; sub malfavoraj kondiĉoj ili provos denove krei la perditan hejmon, ion, kion ili devis forlasi sur la Tero. Ĉu ili sukcesos ĉe la novaj bordoj ...?

Parte jes: dum jarcentoj oni penos adapti la novan medion por pli oportuna vivo de pluaj kaj pluaj generacioj. Denove, post longa tempo, la homo, la

homa volo festos triumfojn. La vivo akomodigos ... Ben Akir rigardas antikvan reliefon super la enirejo de la piramido kaj meditas: Paŝon post paŝo oni konstruos Novan mondon, kreos novan historion, ĉizos novajn dokumentojn de la homa volo kaj scio. Jam oni ree trovos vojon al Belo, restarigos la kulturon ...; iam post satigo de la bazaj bezonoj. La nepoj de la fuĝintoj pridubos fabelojn pri feliĉa vivo sur la Tero.

Ben Akir profunde amas la Terpatrinon; li havas la memoron pri epokoj. Kiom aĝa li estas ...? Li mem tion ne scias; eble tridek, tricent ..., aŭ pli? Li igas la cerbon bobeni rememorojn: la pensoj reiras, dum li rigardas la misteran pejzaĝon de Gizeh, la Valon de la Reĝoj, reiras tra jarcentoj, jarmiloj. Ben Akir sekvas la historion de la homaro ... Sur la sama loko ekstaris iam Napoleono, Cezaro, Aleksandro! Sed la spirita rigardo penetras multe pli profunden ...; subite li ne sentas sin sola, ĉio ondas de moviĝantaj homoj. Centoj da homoj, brunaj kaj nigraj, portas laborajn, bretojn, rulas grandajn ŝtonblokojn; sonas ordonoj en nekonata lingvo. Oni komencas konstrui la Grandan Piramidon. Ben Akir observas la Sfinkson: jes, ĝi staras -- ĝi do ekzistis jam longe antaŭ la piramidoj! Giganta leona silueto reliefiĝas sur la krepuska fono. Ben Akir provas retroirigi la memoron pluen, streĉas la menson ...: vane! La enigma Sfinkso staras firme. La suno jam subiris en skarlaton kaj oriente aperis mallarĝa arko de la luno. Ĉirkaŭ la majesta kapo de la Sfinkso briletas aŭreolo, zono el pura oro. Ĝiaj larĝe malfermitaj okuloj rigardas hipnote, kaj du violetaj flamoj brilas en ili. Ben Akir klinas la kapon, por eviti la rigardon, sed en la momento malfermigis pordo kaj el interno de la koloso eliras klara lumo ...

La violetaj flamoj klariĝis kaj super la Sfinkso ekradiis sep steloj. Ben Akir atente esploras la okulflamojn kaj atendas...

-- Mi estas Centro de la Tero: ĝia Templo -- sugestas la violetaj flamoj.

-- La fino ..., Sfinkso? -- flustras Akir kaj ĝi mute respondas:

-- Mondo eternas: neniam estis komenco, neniam venos la fino. Metamorfozo estas leĝo ununura ...!

-- Kien mi iru ...?

-- Ripozu..., dum certa tempo; restu ĉe mi, filo mia -- aŭdiĝas subite velura voĉo. Ben Akir turniĝas mirigita en la direkton, de kie sonas la mole trankvilaj vortoj ...; sed neniu estas videbla, nun la enirejo de la piramido lumas verdete. Akir turnas sin ree al la Sfinkso, streĉas la aŭdon ...

-- Jen, la sep steloj: sep magiaj vortoj akompanas


>>>

En la somero de 1934, en aĝo de preskaŭ 13 jaroj, mi restadis en la nord-okcidenta Rumanuja urbo Satu-Mare. La filo de mia gastiganta familio altiris mian atenton al notlibro-formata broŝureto kun la rumanlingva titolo "Ŝlosilo de la lingvo Esperanto", en montra fenestro de libro-vendejo Tio estis la t.n. Ĉefeĉ-ŝlosilo. Mia amiko aĉetis ĝin kontraŭ 5 leoj, kaj ni povis poste impresiĝi pri la praktika valoro de la proponata lingvo.

Tri jarojn poste, kiel jam triajara lernanto en la Rabena Seminario en Budapeŝto, Hungario, mi havis okazon denove aŭdi pri Esperanto. Tio okazis en kadro de t.n. memkleriga rondo. Unu el la lernantoj de pli alta klaso prelegis pri Esperanto. La ideo pri facila, belsona logika, internacia lingvo fascinis kaj kaptis nian junan fantazion. Tiam mi estis studinta plurajn lingvojn: la francan, germanan, latinan, malnovgrekan, ioman aramean gramatikon, kaj memkompreneble la hungaran, rumanan kaj hebrea lingvojn. La unua - gepatra, la alia ŝtata, la tria - nia nacia lingvo.

Baldaŭ poste formiĝis grupo de lernantoj, kiuj serioze ekinteresiĝis pri la ebleco ellerni tiun lingvon. Ni akiris per komuna mono la lernolibron de Medgyesi, kaj transdonante ĝin de mano al mano, ene de malmultaj semajnoj ni jam tiagrade posedis ĝin, ke ni decidiĝis ekviziti Esperantan klubon. Dume ni inter ni praktikadis E-on, tiamaniere, ke promenante surstrate, laŭkonsente dum difinita tempo ni parolis nur E-e. Laŭ mia scio, tiutempe [1937] funkciis en Budapeŝto du E-aj kluboj: unu "burĝa", kiun frekventis elstaraj samideanoj, tiutempe jam tutmonde konataj, kiel Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Ludoviko Tarkony k.a. La alia klubo estis laborista, ankaŭ ĝin ni vizitis unu aŭ du fojojn, ĝis iu bonvoleme avertis nin, ke ni prefere detenu nin de amikaj rilatoj kun socialistaj samideanoj, ĉar la duon-faŝista reĝimo suspektas ilin per simpatio al komunismo, persekutita en la dum milita periodo. Mi

persono havis duoblan kialon obei la konsilon - unue pro mia judeco, due pro mia fremda ŝtataneco, kaj malgraŭ mia simpatio al la laborista movado, mi ne emis endanĝerigi la daŭrigadon de miaj studoj. Kio altiris min persone al E-o estis ne



nur la elstarajoj de la lingvo, sed ne malpli la amika, varma etoso kiun ni renkontis en la klubejo ERA [Esperanto-Rondo Amika]. Kompreneble, ni tuj prezentis nin kiel lernanto de Juda Teologia Seminario. Tiam mi konsciiĝis, ke esperantistoj apartenas al homoj de pli nobla speco. Tion pruvis inter alie Kalman Kalocsay, ne nur elstara esperantista verkisto kaj poeto, unu el la plej grandaj post Zamenhof, sed ankaŭ senriproĉa, vera humanisto. Dum la plej ŝtormaj tempoj, plej kruelaj persekutoj (1944), Kalocsay ne hezitis savi la vivon de mia kolego, samideano kaj bona amiko, vivanta ankaŭ nun en Hungarujo, je prezo de endanĝerigo de propra vivo. Savado de judoj kalkuliĝis gravega krimo, ilia murdo - patriota ago. La agokrucistoj [hungaraj nazioj] senceremonie, surloke murdadis la kristanajn kaŝintojn kune kun la judaj kaŝitoj.

Jen ankaŭ pro tio nestas profunde en mia koro la amo al la Internacia Lingvo Esperanto. Jen pro kiel mi restos fidela al E-o ĝis mia lasta spiro.

verkis **Teddy Löwenkopf** (1934-2017), Israelo

Fonto: <http://www.oocities.org/athens/cyprus/5318/8/kiel.mi.esperantistigxis.html>

>>>

la Vojojn. Unu ankoraŭ estas irota ... La Vojo de l' Silento!

--- --

Sep steloj super la Sfinsko estingiĝis, sube ekregis mallumo. En la profunda nokta silento naĝas arĝenta Luno super la dezerto. Ben Akir proksimiĝas al la Granda piramido, por momento ankoraŭ hezitas ĉe la enirejo, poste decide paŝas la sojlon de la koridoro. La verda lumo cedas antaŭ li pli kaj pli profunden. Peza bronza pordego fermiĝis senbrue ...

Ekstere ekfajfegis sabla ŝtormo, densa nigrega nuboj kovris la firmamenton ... Tempo kaj Spaco

kunfandiĝis.

de **Ŝtefo URBAN**

aperis en **Norda Prismo**, 1956/2 paĝoj 62-63

[Ŝ. Urban estas talenta prozisto, komponisto kaj poeto (plej ofte de epigramoj).]

Fonto: <http://www.ipernity.com/doc/esperanto-muzeo-svitavy/10283650/in/album/228556>

Tra Tempo kaj Spaco kun Ferdinando Feguto

de Don HARLOW

Laŭ personoj inventitaj de Reginald Bretnor

[Noto: En la usona sciencfikcia tradicio, unu bone konata nomo estas tiu de Ferdinando Feguto (angle: Ferdinand Feghoot). Feguto estis-as-os kosma aventuristo kaj esploristo, kies spertoj fariĝis landfamaj en la 50aj kaj 60aj jaroj. Por ĉiu renkontita problemo li sukcesis trovi inĝenian solvon, kutime per vort-tordo. Li estis la kreaĵo de iu "Grendel Briarton", kiu fine evidentiĝis kiel Reginald Bretnor (por kiu "Grendel Briarton" estas anagramo). Mi lastatempe eksciis, ke Feguto estis-as-os ankaŭ esperantisto, kiel pruvas la jena anekdoto el lia aŭtobiografio.]

En la jaro 2278 p.Z. (post Zamenhof), Ferdinando Feguto partoprenis lingvistikan ekspedicion al la fora kaj malmulte konata planedo Arbario. Arbario estis eksterordinara loko: ĝi estis la hejmo de raso da inteligentaj, civilizitaj arboj. La ekspedicio havis duoblan celon: studi la metodon de interarba komunikado, kaj kontroli, ĉu la planedo estas preta por aneco en la Tutgalaksia Federacio.

La komunikada sistemo de la Arbarianoj estis eksterordinara. Ili ne uzis sonojn por interparoli, sed -- same kiel Teranaj arboj, laŭ eltrovo de la unua jarcento p.Z. -- ili eligis kemiaĵojn, kiuj portis komunikaĵojn al najbaraj arboj. La komunikado okazis pere de ĉenaj molekuloj. La ĉefa parto de la molekulo estis longa, centra ĉeno -- la sintaksa strukturo de la molekula frazo, por tiel diri -- al kiu fiksiĝis, je diversaj lokoj laŭlonge de la molekulo, diversaj radikaloj (la vortoj). Je unu pinto de la ĉeno troviĝis aparte granda kaj kompleksa radikalo, kiu kapablis aliksiĝi al la sensiloj de alia arbo, kaj kiu rolis por identigi la apartan specon de la eliginta arbo. Ĝi tamen ne povis fiksiĝi al la sensiloj de arboj en aliaj regionoj de la planedo, se tiuj ne estis modifitaj per daŭra ekzercado. Efektive, tiuj identigaj radikaloj servis por distingi inter diversaj regionaj "lingvoj". Ili ankaŭ povis efiki al la homa nazo, kie ili sentiĝis kiel facile distingeblaj aromoj.

Por teranoj, estis en tiu tempo ĝenerala kutimo, ne rekte intertrakti kun neanimalaj civilizoj; tio devenis de aparte embarasa okazo kiam inteligentaj laktukoj el la planedo Klorofilio, vizitante en Japanio kaj registrante sin en hotelo, sub la rubriko "speco" skribis "vegetalanoj" kaj pro lingva konfuzo ricevis por la vespermanĝo salaton. Ĉe Arbario la homa ekspedicio

do kontentigis sin, sendante ĉiutage sondilon al la planedo. En la sondilo troviĝis diversaj hermetikaj kestoj, kaj ĉe ĉiu loko vizitata de la sondilo, unu el la kestoj malfermiĝis, sorbis iom da aero (kaj komunika gaso), kaj poste resigelis sin.

Kiam la sondilo la unuan fojon revenis al la kosmoŝipo, la homojn ege surprizis kaj konsternis la nombro kaj diverseco de arboj "lingvoj", ĉar unu el la postuloj por aniĝo en la Tutgalaksia Federacio estas la ekzisto de tutplaneda lingvo, same kiel Esperanto sur la tero.

Malfermante la unuan keston, la ekspedicia komandanto Lordo Sir Basil Cholmondely Fffoulkes-Schweppes flaris la enhavatan gason. "Ĝi memorigas min pri la sinua serpentumado de submaraj senvertebruloj," li aliteraciis. "Mi nomos tiun arban lingvon la angila lingvo."

La duan keston malfermis specialisto pri la aliplanedaj lingvoj, profesoro Yang Gui-zi. "Ha, mi sentas la odoron de subtera ŝimo kaj kruda ŝtalo, kvazaŭ en karcero. Evidente temas pri la ĉena lingvo."

La ekspedicia botanikisto, Adolf von Bierstein, malfermis sian keston kaj ĝue flaris la enhavon. "Estas kvazaŭ la burĝona periodo de la printempo," li kartavis. "Certe estas la ĝermanta lingvo."

Inĝeniero Juri Sergeevič Kolĥozov, etendante la nazon al sia kesto, diris: "Fero, sub griza ĉielo kaj konstanta pluvo. Estas la rusta lingvo."

La kuiristo, Jules Cherchezlafemme, fermis la okulojn por ĝui la odoron el sia kesto. "Ĝi memorigas min pri la intima aromo de mia amatino," li elvokive diris.

Sed troviĝis neniu odoro komuna al ĉiuj kestoj. La diversaj ekspedicianoj jam estis pretaj rezigni pri tiu tutplaneda lingvo, kiu necesis por aniĝo en la Federacio; sed ... "Atendu," proponis Feguto. "Mi ankoraŭ havas esperojn. Unu specialan odoron mi serĉas. Kiam ni trovos ĝin, ni tuj ekscios, ke ĉi tiu planedo estas plene civilizita kaj preta por interplanedaj kontaktoj."

Do, tagon post tago, ili sondis diversloke la planedon. Ĉiam pli kaj pli da lingvoj regionaj kaj etnaj -- se efektive arboj ekzistas en etnoj -- ili trovis, kaj ili eĉ lernis elkodigi kaj kompreni tiujn kemiajn lingvojn. Sed ĉiutage, mankis tiu odoro komuna al ĉiuj kestoj, kiu absolute necesis por pruvi la civilizitecon de la inteligentaj arboj.

Kaj fine, unu tagon, malferminte la unuan keston, Sir Basil trovis tute novan, iomete spican, odoron. "Ĝi elvokas en mia menso la freŝan spiron de junulino, ĵus iom puriginta la buŝon," li ĝemis.

El la dua kesto, plenigita aliflanke de la planedo, venis la samaodoro. "Ĝi memorigas min pri tiuj altaj, malvarmaj likvoraĵoj, kiujn mi kutime ĝuas, sidante vespere sur la verando de mia tropika loĝdomego," elgorĝigis von Bierstein.

El la tria kesto, kies enhavo devenis de la arkta regiono, fluis la sama gaso. "Ha, mi pensas pri kelkaj el tiuj unuajarcentaj cigaredoj, kiuj promesis esti ne tiel buŝpikaj," komentis Kolĥozov.

"Sinjoroj," Feguto diris, "jen absoluta pruvo, ke iu legoma Zamenhof sukcesis sur ĉi tiu planedo inventi artefaritan tutplanedan lingvon, vere verdan lingvon, kiu sukcesis disvastiĝi eĉ ĝis la antipodoj, kaj kiu pruvas la civilizitecon de niaj arbo-samideanoj."

"Kaj pro kio vi supozas tion?" demandis Yang Gui-zi.

"Ĉu vi do ne rimarkis," saĝe demandis Feguto, "ke en la sondon venis nova mento?"

Ankoraŭ nekonvinkite, Yang Gui-zi mallevis sian vizaĝon al unu el la kestoj, kaj tre zorge flaris. Subite li levis la kapon. "Mi tamen dubas, ĉu ĉi tiu gaso povas kovri la tutan planedon," li diris, "ĉar ĝi estas tro peza por difuzi tra la atmosfero. Granda kaj plej pura parto ankoraŭ kuŝas sur la malsupro de la kesto."

"Kio ja pruvas mian hipotezon," respondis Feguto. "Kion vi flaras en la fundo de la kesto, tio estas la Funda Mento de Esperanto."

Fonto: <http://www.ipernity.com/doc/esperanto-muzeo-svitavy/11322645/in/album/228556>

Ni ne subtaksu Esperanton !

Ekzistas inter multaj Esperantistoj nenecesa modesteco pri Esperanto.

Ili kvazaŭ petas pardonon, ke nia lingvo estus en elementa kaj duonmatura stato kaj devus ankoraŭ kreski por akiri egalan disvolviĝon de la etnaj lingvoj.

Ili daŭre parolas pri la malfakto, ke Esperanto devas nature evolui. Ili ne vidas la diferencon inter etna kaj artefarita lingvo, kaj pensas ke artefarita lingvo bezonas saman "nature" historion kiel etnaj. Mallonge: ili kredas ke Esperanto plu ne estas plenkreskinta.

La precipa danĝero de tiu miskompreno estas, ke ili kaj iliaj Esperanto-lernantoj sentas la bezonon helpi, eĉ neprofesie, en tiu disvolviĝo kaj krei KAJ pli bonan gramatikon (neebla!) KAJ multajn neologismojn (nenecesajn). Ili kreas kaj kreskigas, ofte ludeme kaj preskaŭ ĉiam sen scienca kompreno pri la malsama karaktero de natura lingvo kaj internacia lingvo. Tiel Esperanto fariĝas senvalora ludilo de elituloj, kreskante el fidebla interlingvo al etnosimila malpraktikaĵo.

Eĉ la ne-Esperantistoj plejparte ne komprenas la necesajn formon kaj funkciadon de artefarita lingvo, postulante ke la Esperantistoj zorgu ŝanĝi sian lingvon al etnolingvosimila t.n. "riĉa" linĝvo.

El la komenco Esperanto jam estis preskaŭ perfekta. Ĝi ne povas esti tute perfekta, ĉar ĝi dependas parte de homaj kaj naturaj cirkonstancoj neperfektaj. Sed ĝi nun ne povas, nek bezonas, pliperfektigi, ĉar iu ajn ŝanĝo en ĝiaj gramatikaj reguloj rajtigus pliajn kaj ĝi evoluus al komplete ne plu fidebla stato. Ĝiaj reguloj pri vortformado forlasatus kaj la lernenda vortaro fariĝus same obstakla kiel tiu de etnaj lingvoj.

verkis Marcel Leereveld, el Aŭstralio

Ĝia jama kaj neŝanĝinda perfekteco preskaŭ konsistas en tio, ke ĝiaj gramatikaj reguloj permesas kiomeblan mankon de miskomprenoj, kaj ke ĝiaj vortstoko kaj vortkreadeblo jam donas al ni vortojn por ĉiuj antaŭaj nocioj kaj la plejmulton de vortoj por estontaj nocioj teĥnikaj kaj kulturaj.

Ankaŭ etnaj lingvoj posedas la eblecon krei por novaj nocioj teĥnikaj kaj kulturaj vortojn el sia propra stoko, kvankam tio okazas t.n. "nature" kaj tial kaŭzas nefideblecon de signifoj. Sed la plej multaj ŝanĝoj en la naturaj lingvoj kreas nenecesajn kaj kapricajn kaj malfacile lerneblajn vortojn kaj esprimojn. Temas precipe pri donado ante signifojn al alisignifaj vortoj kaj pri kreado ante vortojn kaj vortkombinojn kun neregulaj signifoj.

Esperanto estas en tiu aspekto perfekta, ĉar ĝi ne allasas, aŭ almenaŭ ne allasi devas, nelogikajn kaj neregulajn vortkunmetojn kaj vortkombinojn. Se ni lasus Esperanton kreski t.n. "nature", ĝi fariĝus same malfacile lernebla, same nefidinda, kaj tial por internacia uzo same netaŭga kiel la etnaj lingvoj, kaj precipe la angla pro sia uzo de KAJ tono KAJ kombinligiteco por distingi signifojn.

Do ne modestu, ne postulu nenecesan "disvolviĝon", kaj fieru pri la jama perfekteco preskaŭ de nia lingvo.

Marcel Leereveld

Fonto : **Aŭstralia Esperantisto** AE383



Rakonto pri Petro


-- amuze rakontas **Mauricio Brucco el Hispanio**

Do, ĉi tiu estas la rakonto pri Petro, la homo kies nepo estis samtempe ankaŭ lia avo. Ne, ne, ne rigardu min tiel. Mi scias ke tio ne eblas, sed okazis. Kulpigu la genetikajn eksperimentojn, se tio povas trankviligi vian logikon, vian rezonadon.



Ankaŭ Petro estis tre surprizata kiam li sin trovis antaŭ tia fuŝaĵo. Sed post iom da tempo, la afero perdis siajn ecojn de eksterordinareco, kaj neniu plu surpriziĝis. Kompreneble, kunvivi kun tia nep-avo ne estis facile, kvankam li multe amis lin. Ekzemple, kiam ili iris al la parko, Ludoviko (tiel nomiĝis la infan-maljunulo) kutime diris: "Avĉjo, bonvolu doni al mi bombonojn", kaj Petro, kiu emis dorloti sian nepon, aĉetis la

bombonojn. Sed tuj poste, kun tiuj sukeraĵoj en siaj manoj, Ludoviko ĵetis al li riproĉan rigardon kaj diris: "Mi ne povas manĝi ilin, vi devus scii, mi estas maljuna kaj mi devas zorgi pri mia diabeto".



Kaj ankaŭ en la kinejo, la muziko ne malsamis: "Bone, kiun filmon vi volas vidi?" demandis Petro. "Animaciaĵon!" ekkriis Ludoviko bonhumore. Petro aĉetis la biletojn. Kaj jen tuj poste la avo duono de Ludoviko ekparolis: "Ĉu animaciaĵon? Ĉu vere? Ĉu vi pensas ke mi estas bebo? Mi volas vidi ion pri la dua monda milito! Ĉu mi iam rakontis al vi pri kiam, en la batalkampo, mi kaj mia amiko.."

Sed Petro jam ne plu estis aŭskultanta tiun historion, kiun li aŭdis plurfoje antaŭe. Kompatinda homo, ĉiam la sama rakonto! Kaj tamen, ankoraŭfoje li ŝajnis sin interesata al la litanio de sia amata nep-avo, dum ridetante li forĵetis la biletojn en la paper-rubujon..

sendis **Maurizio Brucco** el Hispanio

Kavo

verkis **Apáti Kovács Béla** el Hungario

Viro sola fosas kavon. La grundo estas ŝtona kaj pro tio la laboro estas tre malfacila.

Li ŝvitas. Ofte li ĉesas la fosadon por ripozi.

Suno arde brilas kaj li jam estas ankaŭ soifa.

Sed li ne havas akvon. La botelo jam malpleniĝis.
— Terure! — ĝemas la viro. — Almenaŭ se mi havus guton da akvo.

Malgraŭ la petego en la botelo ne estas akvo.

Neatendite alia viro alvenas. Li havas bonan humoron. Li ridetas.

— Kion vi faras? — li demandas kaj scivole li rigardas la fosantan viron.

— Ĉu vi ne vidas? Mi fosas — li respondas kaj ĉesas la fosadon.

— Kion vi fosas?

— Kavon.

— Kial?

— Ĉar tie ĉi ne estas kavo. Mi volas fosi kavon.

— Vi pravas. Se ne estas kavo, tiam oni devas fari.

Bonega ideo. Ĉu vi deziras, ke mi helpu al vi?

— Ĉu vi helpus?

— Kial ne? Mi volonte helpas.

La viro foriras kaj baldaŭe revenas kun alia fosilo. Nun jam ili fosas duope.

Ili silentas. Ili mute nur fosas. Ili ambaŭ estas tre soifaj. La botelo estas malplena.

— Mi soifas — diras iu fosanto.

— Ankaŭ mi — respondas la alia.

Nenio okazas. Ili nur fosas kaj fosas.

Dume ili soifas.

Venas ankaŭ aliaj homoj. Ili ĉiuj helpas

La kavo estas jam tre granda kaj profunda. Ili apenaŭ parolas, ĉar ilin torturas la soifeco. Paroli soife estas dolora.

Neniu scias, kial ili fosas la kavon. Ili sentas, se la kavo pretiĝos, tiam ĝi kunligas ilin kaj en la estonto ĉi tiu kavo estos ilia komuna verko.

Fosi, fosi sen akvo ĝis la eterneco. Ĉi tio spicas ilian vivon.

En la malproksimo knabeto ekaperas kaj ekkrias:

— Onkloj, mi portis akvon. Kiu deziras trinki?

Ili ĉiuj ĉesas la fosadon kaj avida trinkas per grandegaj glutoj la akvon.

Kiam la homoj estingas la soifon ili daŭrigas la fosadon kaj la kavo iĝas pli granda de tempo al tempo ĝis la eterneco.



verkis **Apáti Kovács Béla** el Hungario

Egulo iradis kampe matene. Li estis forta kaj blonda, li havis grandajn, grandajn sed mildajn manojn. Li kutimis meti en siajn poŝojn florojn,



multajn florojn, foliojn, branĉetojn, fruktojn, semojn kaj eĉ bestetojn, kiujn li kolektis dum siaj kamparaj promenadoj. Poste, parolante kun si mem, li revenis hejmen kun la okuloj plenaj de lumo. Li metis la florojn en florujojn, semis, kaj gardis la bestetojn en la korto. Li ornamis

sian domon kvazaŭ ĝi estus kastelo; sed li ne estis feliĉa, li estis sola, li volis trovi belan kaj bonan knabinon, por ke ŝi loĝu kune kun li.

Tre proksime etulino loĝis en malgranda groto, kiu estis tre pura kaj ornamita. Ĉiutage ŝi eliris kolekti florojn, la plej belajn floretojn en la tuta ĝardeno. Pli poste, sidante en sia saloneto ŝi kudris kaj pensis, ŝi pensis pri bonaspekta viro, kiu loĝus kune kun ŝi.

En la ĝardeno kreskis oranĝarbo, sed ĝi ne estis ujajn oranĝarbo, ne!, tiu ĉi arbo povis aŭskulti kion oni diris ĉe ĝi. Ĝi ankaŭ povis realigi kelkajn dezirojn. La speciala oranĝarbo ne estis bela, ĝi malbonaspektis kaj pro tio la egulo tre amis ĝin. Li ornamis kaj akvumis ĝin ĉiutage. Kiam la egulo estis malgaja, li iris ĉe la oranĝarbon. Lun tagon ornamante ĝin li diris: “Se mi havus belulinon mi estus tre feliĉa”.

La oranĝarbo pensis: “Kiel mi povas helpi lin?”

La etulino promenadis ĝardene kaj kiam ŝi piediris proksime de la oranĝarbo laŭte ŝi al si diris: “Se mi

havus belulon mi estus la plej feliĉa virino en la mondo”.

La oranĝarbo ridetis kaj diris: “Morgaŭ la egulo vidos la etulinon”.

La sekvintan tagon frumatene la egulo eliris kaj kiel kutime li promenadis ĝardene. Ekvidinte ruĝhararan sciureton, li ĝin kaptis, sed kiam li havis ĝin ĉemane li povis konstati, ke ĝi ne estis sciureto, sed tre bela ruĝharara etulino. Ŝi kolere diris: “Lasu min tuj”, sed rigardante lin ŝi trankviliĝis, ĉar ŝi vidis lian belan vizaĝon kaj ŝi tre ŝatis lin. Li ankaŭ ŝatis ŝin kaj ekdemandis: “Kiel vi nomiĝas? Kie vi loĝas? Kion vi faras ĉi tie? Kien vi iras nun? Se vi volas vi povas veni en mian hejmon. Tie ni povas paroli pli trankvile, mi... mi loĝas sola.”

Ridante, la etulino respondis: “Momenton, momenton, iom post iom. Mi nomiĝas Klara kaj mi loĝas tie, ĉu vi volas eniri?” Sed kompreneble, la egulo ne povis eniri en tro malgrandan groton, do, ili iris en lian domon. Neniam ŝi vidis domon tiel belan. Ili multe interparolis kaj finfine interkonsentis kuniĝi.

La egulo sentis sin tre kontenta. Li tenis Klaran ĉemane kaj ili babilis, sed iun tagon akvumante la ĝardenon li diris: “Se mi estus pli malgranda, Klara kaj mi povus esti samkiel la aliaj paroj”.

Alian tagon, Klara kolektante floretojn diris: “Se mi estus pli granda...”

Post kelkaj tagoj la bestetoj, la arboj, la floroj kaj la aliaj loĝantoj en tiu ĉi loko vidis ruĝhararan egulinon, kiu promenadis ĝardene tenante en sia mano blondan etulon, kaj oni kredas ilin feliĉaj.



verkis kaj sendis **Pedro Fernández Rodríguez** el Kubo

Mia renkontiĝo kun Andreo Cseh

Mia konatiĝo kun Esperanto okazis en dolĉa duopo kun la lernolibro de Julio Baghy en 1962. En la sama jaro mi partoprenis mian unuan Universalan Kongreson en Kopenhago. Ĉiela travivaĵo estis por mi, ke homoj el la plej diversaj nacioj parolas antaŭ la mikrofonoj, kaj mi komprenas ilin, eĉ miaj najbaroj el Nederlando, Francio, Britujo aŭ Madagaskaro komprenas la samon. Kun ĉi tiu entuziasmo mi raportis hejmenveninte pri la travivaĵo al miaj familianoj kaj - estante reformita pastroedzino - ankaŭ al la membro de nia komunumo. Tuj anoncis sin pluraj homoj, kiuj nepre volis lerni ĉi tiun mirindan lingvon. Ejon ni disponigis kaj la Grupo Egressy, en kiu mi membriĝis,

rekomendis al ni maljunan sinjoron, dr-on Tibor Réthelyi por instrui nin.

Li estis diplomita Cseh-instruisto, kiu iam antaŭ la milito instruis eĉ en Svedio. Li alvenis al nia plenkreskula grupo kaj el lia aktujo ekaperis skatoloj, koloraj kraĵonoj kaj kretoj, bruna hundeto kaj blanka kato el gumo. Ĉarme li prezentis al la grupo koncize la gramatikon, la simplajn frazojn, demandojn kaj respondojn. Ni ĉiam respondis ĥore, tiel li sukcesis elparoligi eĉ la plej retiriĝemajn membrojn. Mi estis ravita, kaj mi decidis, ke ankaŭ mi nur laŭ ĉi tiu metodo deziras instrui Esperanton. Eĉ en miaj notoj jam aperis propraj ideoj pri tio, kiujn ekzemplojn mi prezentos iam al miaj gelernantoj.

Tiel alvenis la jaro 1964, kiam en la UK en Hago mi persone renkontis Anderon Cseh, vidis kaj aŭdis lin instrui. El mia malmulte da mono mi partoprenis lian seminarion, eĉ mi aĉetis la instru- kaj help-materialojn.

Neforgeseblaj estas por mi la lecionoj de Andreo Cseh! Kiel la plej elstaraj aktoroj, li ne uzis larĝajn movojn, teartecan prezentmanieron - do ne "arlekenis", tamen ni ne povis ne atenti pri li. Eleganta, ĉarma parolo akompanis lian movojn dum inter la lertaj fingroj elformiĝis etaj tablo kaj seĝo ek papero. El la tuta ridetanta homo elradiis bona humoro tiel, ke la grupo ne deziris forlasi la ejon post la fino de la seminaria horo.

Ne plu mi havis la okazon persone renkonti lin, sed en la koro mi gardas la bildon de la ideala studhoro, kie la partoprenantoj streĉe atentis kaj kun ĝojo malkovras la regulojn. Poste mi aplikis liajn konsilojn en pluraj lokoj en- kaj ekstrlande, kaj mi gvidis jen kursojn, jen seminariojn en UK-oj en Varna /1978/; Luzern /1979/; Antwerpen /1982/; Beijing /1986/.

Jes, liaj famaj "Konsiloj al la Instruantoj"!

El lia sinteno multe kaptis min tiuj frazoj: "Preparu vin bone al ĉiu leciono, por ke vi estru la materialon kaj la lernantaron" - /sed/ "Ne imitu sklave, sed ŝanĝu, transformu la materialon laŭ la bezonoj. La skribita kursteksto ne estu kateno por vi, sed ekzemplo kaj konsilo!" Ho, kiel dankeme mi pensis pri li pro ĉi tiuj frazoj, ja mi mem ofte spertis, ke ĉiu nova grupo starigis novajn pretendojn. Eĉ miajn proprajn notojn mi neniam povis senŝanĝe uzi en la sekva jaro.

Sed plej profunde tuŝas min ĉiam lia lasta konsilo: "Vivigu vian tutan laboron amo al Esperanto kaj amo al viaj lernantoj! Tiam vi brile sukcesos, kaj miaj konsiloj estos superflujaj."

Jes, kara Andreo Cseh, ankaŭ en via personeco AMO estis la plej forta instigilo. Tial via scio ne estis humiliga por la nesciantoj, sed inspiriga kaj kuraĝiga.

Tiu ĉi vera amo faras la instruiston inventema, kaj

laŭ la pado de Andreo Cseh gvidos nin antaŭen al ĉiam pli sukcesa transdonado de nia trezoro: la Lingvo Internacia.

Éva Farkas-Tatár

Budapeŝto, januaro 1995



La foto pretiĝis dum la menciita Cseh-seminario en Hago, en 1964. S-ino Farkas sidis plej maldekstre en la dua vico.



Ankaŭ la supra foto estis farita dum la haga seminario. La instruantan Andreon Cseh eternigis sinjoro Une Hukstra.

Ĉu iu memoras la skandalon okazintan en 1934? de Marcel Leereveld el Aŭstralio

Maljunaj legantoj de "A. E." eble memoras, kio okazis en la fino de la jaro 1934.

Mi havas en mia mano eltranĉaĵon el nederlanda ĵurnalo de Merkredo 24 Oktobro 1934, kiu montras planmapon pri Melburno, kaj planmapon pri la internacia flughaveno kiu tiam situis en Essendon, kun indiko de la fortotensiodratoj ĉirkaŭ la flughaveno, kiujn ĉiu flugmaŝino devis eviti (sed ne ĉiam sukcesis!). La mapo de Melburno montras la tiam ankoraŭ ekzistantan flughaveneton "Coope Island Airport" tre apudan al la centro de Melburno.

Kial la mapoj? Nu, en tiu jaro oni organizis konkurson de flugmaŝinoj, do ankaŭ de la kapablo de iliaj pilotoj, inter Londono kaj Melburno laŭ Sidneo.

Ĉeestis du specoj de konkurso, unu por pasaĝerflugiloj kaj unu por ŝarĝflugiloj.

Partoprenis la kompanioj de pluraj landoj, ankaŭ la nederlanda K.L.M. (=Koninklijke Luchtvaart Maatschappij = Kingly airfare mateship = Reĝa Aerovojaĝa Asocio). Kiam la flugmaŝinoj eniris Aŭstralion, la du unuaj estis la KLM-flugiloj. Tio tre ĉagrenis la organizantojn britajn kaj aŭstraliajn, kiuj ja organizis la konkurson por reklami la Britan Aerkompanion. Sed



>>>

Ĝi ne estas Perdita!

Ni lernu Esperanton!

Fraŭlino barkoveturis kun sia servistino. Preparante betelomaĉaĵon por sia mastrino, la senpripensulino delasis en la riveron etan kalkopoton el ĉizelita arĝento, veran juvelon. Kiam ŝi estis liberigita de sia emocio, la servistino trankvile demandis, kvazaŭ nenio grava okazinta:

- Ĉu oni povas konsideri, Fraŭlino, iun objekton kiel perditan, kiam oni scias, kie ĝi troviĝas?
- Kiel stulta vi estas! Certe ne!
- Feliĉe! Tiam, ĝi ne estas perdita!

- Kio? Kio ne estas perdita?
- Via kalkopoto! Mi delasis ĝin en la akvon, sed mi bone scias, ke ĝi troviĝas ĉe la fundo de la rivero.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/gxi-ne-estas-perdita/>

Vortareto

delasis - ne teni plu, ne malhelpi, ke iu aŭ io falu, foriru.

stulta - ne inteligenta, sensprita.

Interŝanĝo

Ni lernu Esperanton!

Li estas riĉa sed ne ŝatas la elspezojn. Iun tagon, li akceptas tre malnovan amikon.

- Ho ve! - li plendas - vere en malespero mi troviĝas. Mi volus vin reteni por tagmanĝo, sed mia manĝoŝranko estas malplena.

- Ne gravas! - diras la amiko. Vi nu ordonu, ke oni buĉu mia ĉevalon, kaj ni povos festenigi tiel, kiel du reĝoj!

- Sed, kiamaniere vi revenos hejmen? - demandas la avarulo nur por la ŝajno.

- Ne malfacile! Kun via permeso, mi prenos, kiel rajdobeston unu el tiuj gradikaj anseroj, kiuj promenas en via korto. Ĝi ja povos anstataŭi mian ĉevalon, nepre!

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/intersxangxo/>

Vortareto

akcepti (iu iun) - lasi eniri en sian domon, hejmon kaj similaj.

buĉi - mortigi bruton por homa nutrado.

festeno - luksa, abunda kaj festa manĝo.

korto - sentegmenta spaco, ĉirkaŭita de konstruoj, el kiu la ĉambroj ricevas lumon kaj aeron.

plendi - esprimi per vortoj sian doloron.

>>> oni trovis solvon . En Aŭstralio funkciis kontrolstacioj, kiuj ankaŭ ordone indikis al ĉiu flugmaŝino en kiun direkton flugi. Kaj ĉiuj devis pasi tra Sidneo. Do kiam la unua alvenanto, la pasaĝerflugmaŝino de KLM, alproksimiĝis al Sidneo, la kontrolstacio ĵus antaŭ Sidneo indikis al la KLM-flugmaŝino rekte flugi al Melburno. Tiel oni povis malkvalifiki tiun flugmaŝinon, ĉar ĝi ne iris tra Sidneo, kaj la brita gajnis. Oni ne faris tion al la ŝarĝflugmaŝino. Protesto ne helpis, kaj KLM komprenis, ke pro patriotaj kaj komercaj kialoj tio devis okazi, speciale ĉar la ŝarĝmaŝino de KLM ricevis la unuan premion en sia klaso. Kaj en la tuta mondo oni eksciis pri la falsa rezulto, kiu tial ŝanĝiĝis al reklamo por K.L.M.

verkis **Marcel Leereveld** el Aŭstralio

Solvo de la krucvorttenigmo

NE	RO	NO	BU	FE	DIS	TO
DER	MO	AR	BA	RO	KA	LE
LAN	PE	TI	LO	KA	SI	RA
DO	MI	NI	TU	SI	TA	TA



Kelkaj anekdotoj

Programisto revenis hejmen kaj kato impetas al li, karesas per korpo liajn pantalonon kaj lekas al li manon.

Edzino, vidante tion demandas: "Kio okazis al la kato? Kial ĝi lekas vian manon?"

"Stranga demando! Ja la mano havas odoron de muso."

- o -

Katino vivanta en garbejo havis kvar katidojn. Tie trovis ilin hundo kaj pelis ĉiujn en angulon kaj bojjs. Katino kuraĝe stariĝis kaj komencis ankaŭ boji kaj grumblegi al hundo. La hundo ĉesis boji kaj malrapide foriris.

Katino diris al katidoj: "Vidu, kiel utile estas lerni fremdajn lingvojn!"

- o -

En tiu sama vilaĝo vivis du blondulinoj, kiuj komune loĝis kaj mastrumis. Unu lavis sian hararon en banejo kaj vokis duan: "Kion mi faru! Restis al mi bolanta akvo."

"Bolanta akvo estas iam bezonata. Deponu ĝin en fridujon!"

- o -

Blondulinoj promenis kune apud lago en kiu naĝis multaj fiŝoj. Unu demandis: "Ĉu vi kredas, ke fiŝoj povas paroli?"

La dua respondis: "Ne, ili ne povas paroli. Ili estas mutaj."

"Kial do, kial ili estas mutaj?"

"Nu, ĉu eble vi povas paroli, se via kapo daŭre estus en la akvo?"

- o -

Ili venis urbon. Tie staris knabeto, kiu korŝire ploris. Blondulinoj haltiĝis kaj demandis lin: "Kial vi ploras, etulo? Ĉu io malbona okazis al vi?"

"Jes, mi perdis moneron," respondis knabeto.

"Kiom valoras la monero, kiun vi perdis?"

"Du centojn."

"Ne ploru pro tio," konsolis ili lin, „jen, prenu tiun skatolon kun kelkaj restantaj alumetoj, por la kazo, ke vi ne retrovos vian moneron antaŭ nokto."

- o -

Proksime de domo de blondulinoj loĝis du najbarinoj – patrinoj de trijaraj filetoj. Ili babilis ĉe barilo: "Vidu, via fileto jam legas ĵurnalon!"

"Ne, li ne legas. Li solvas krucenigmon! Ankaŭ nia hundo estas tre lerta kaj kapabla. Se ĝi iras hejmen, ĝi tuŝas sonorilon ĉe la pordo."

"Nu, mia hundo uzas propran ŝlosilon."

o

Post minuto revenis hejmen patro. Fileto kriis: "Paĉjo, paĉjo, ni estis en ZOOparko. Tie estis simio tiel granda, kiel vi!" "Tio ne eblas," klarigas la patro, "tiel granda simio, kiel mi, ne ekzistas."

- o -

Ĉiuj loĝantoj de vilaĝo, nu, preskaŭ ĉiuj, vizitis teatron. Aktoroj brile ludis ŝekspiran teatraĵon "Reĝo Rikardo la Tria". En la tre streĉa momento la reĝo, kiun oni jam venkigis kaj kiu volas forkuri de la batalo, krias: "Ĉeval', ĉeval'! La regnon je ĉevalo!!"

Knabo laŭte krias el galerio: "Ĉu azeno sufiĉas?"

La granda aktoro, kies grandan scenon li detruis, kriis responde: "Jes, vi rajtas veni!"

- o -

Knaboj ricevis grandan hundon. Ĝi estis tre bela besto. Laŭ leĝoj la hundoj devas esti ekstere de domo buŝumitaj. Tial ili iris en specialan butikon por bestartikloj aĉeti buŝumon.

"Jen, sinjoretoj, vi povas elekti inter pluraj specoj de buŝumoj."

"Ni prenos ĉi tiun," diris kanboj kaj tuj pagis.

"Ĉu mi sendu la buŝumon al via adreso," demandis gaja, juna vendistino, "aŭ ĉu vi preferas mem porti ĝin?"

- o -

Tiu ĉi vendistino vespere longe ŝminkis kaj vestis sin.

Ŝia patrino demandis: „Kien vi volas iri?"

Knabino diris: "En kulturan domon. En najbara vilaĝo okazas Gaja vespero."

Patrino severe diris: "Je la dekunua horo vi revenos, alie vi vidos!"

"Ni vidos," respondis filino.

Jam je la naŭa la filino revenis kaj silente eniris sian ĉambron. Patrino malfermis la pordon kun demanda mieno ankaŭ silentis. Post ne tro longa silento filino diris: "Mi mislegis. Ne estis gaja vespero, sed geja."

- o -

Virino devis trapasi riveron sur boato. Ŝi estis ununura klientino de boatisto. Ekveturante la virino demandis: "Ĉu estos grandaj ondoj?"

"Mi nenion scias pri tioN," estis la respondo.

"Ĉu vi ne scipovas gramatikon?" miris virino.

"Ne!"

"Do, vi perdis duonon de la vivo!"

Boatisto diris nenion. La rivero estis larĝa. Baldaŭ ekblovis vento kaj la boato estis akvoplana.

"Ĉu vi scipovas naĝi?" demandis boatisto.

"Ne!"

"Do, vi perdos la tutan vivon."

- o -

